

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) de  
l'Ass.Int.d'Etude des enseignements spirituels et théologiques  
Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj & Teologiaj Instruoj  
( faka kunlaboranta asocio de "Universala Esperanto-Asocio" ).



"Ion ni scias : nia dio estas la sama dio.  
Tiu ĉi tero estas altvalora por li."

Indiana ĉefo Sitl

## Vorto de la redaktoro

Mi ege ĝojas finfine povi prezenti al vi la unuan numeron de nia revuo en ties nova formato, pli facile legebla por ĉiuj ol la antaŭa malgranda bulteno, kaj ni kore dankas kaj EPA de Oomoto, kaj Claude Rouget, redaktoro de "VERDire", tre valora ekologiisma gazeto (abonebla ĉe Flandra Esperanto-Ligo) pro ilia nemalhavebla helpo.

Kiel vi povos vidi rigardante la ĉi-malsupran enhavtabelon, multaj jubileoj estas solenataj ĉi-jare, ne nur la pseŭda malkovro de Ameriko (jam atingita de Vikingoj ĉirkaŭ kvin jarcentoj pli frue).

La aperon de multe da materialo mi do devis prokrasti ĝis la venonta numero, despli ke mi volis kiel eble plej frue atentigi "la tutan mondon" pri gravaj krimoj kontraŭ la homrajtoj : mortkondamnoj pro blasfemado, daŭraj torturoj kontraŭ tibetaj monaĥoj, malpermeso al teologoj esprimi sin...

Sed feliĉe vi tamen malkovros ankaŭ kelkajn bonajn novaĵojn, poeziaĵojn kaj pensigajn tekstojn...

## Respondeculo por organizi la IRKE en Valencio serĉata

B.Westerhoff skribas : " (...) Mi povas komuniki al vi ke plej plej probable mi ne partoprenos la UK en Valencio. Tiel estiĝas la demando kiu kaj kiel aranĝos la IRKE ? (...) Mi preferus se la preparojn [mendi salonon ĉe UEA, kontaktiĝi kun prelegantoj...] farus iu kiu poste ankaŭ partoprenos (...)" Volontuloj bv skribi kiel eble plej frue [tuj!] al la redaktejo.

La temo povus esti : "Libereco de kredo : ĉu necesa toleremo aŭ nura indiferenteco ?" Ni atendas viajn rapidajn reagojn kaj proponojn kontribui per 10-minuta prelegeto.

**Asistilo, Organo de Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj**  
"Trimonata" (?!?)

**Redakcio** : 7 rue Parmentier, F-18000 Bourges, Francio (aŭ, nur ĝis 15-5-92, rekte al Ch. Lavarenne, Prestvannet St.Hjem D-120, N-9012 Tromsø, Norvegio)

**Estraro de ASISTI** : Yosimi Umeda (prez.), Ch. Lavarenne (sekr. kaj kas.), Bernhard Westerhoff (kunvenoj), Leif Nordenstorm (Religia Antologio).

**Directeur de publication** : Christian Lavarenne

**Jarabono** : 75 ff/25gld/23DM/15\$ (duonprezo por orienteŭropanoj, afrikanoj, azianoj...) al :  
-franca poŝtkonto "Asistilo, n-ro 10 421 77 R Marseille"

-norvega poŝtgiro : "Christian Lavarenne, n-ro 0525.0589214"

-aŭ 50.000 zł. al Marek Krainski, ul.Albanska 28/2, PL-60134 Poznan

-aŭ UEA-konto "asis-r"

**Subtena abono** : ekde 100 ff, 35 gld, 30 DM, 20\$ ktp. Dankon !

**Abonhelpa fonduso** : laŭ sama tarifo kiu validas por vi mem ; vi povas samtempe indiki adreson al kiu vi ŝatus sendigi Asistilon.

**ASISTI-kotizo 1993** : deviga por esti membro, kia ajn ĝi estu (sed minimumo por okcidenteŭropo kaj nordameriko : 8 gld/25 FF / 7,5 DM

**Subtenanta membro** : ekde 150 ff / 50 gld / 45 DM / 30 \$... Dankon !

## ENHAVO

Kvincentjariĝoj kaj novaĵoj de Ameriko	p. 3
La dialogo inter religioj, Pastoro André Gounelle (F) - sekvo	p. 4
Ĉu estas falsaj religioj ? El verko de Prof. E.Durkheim (F)	p. 5
Ekumena Konsilio de la Eklezioj : K.Raiser (D) novelektita	p. 6
Konsekrado de la XVII-a Karmapa (Tibeto)	p. 6
Alvoko por la defendo de homrajtoj (prizono Drapĉhi, Tibeto)	p. 7
Mortkondamnitaj pro blasfemado (Pakistano, Irano)	p. 7
Katolikaj teologoj malpermesitaj (D, Sud-Ameriko, Esperantio)	p. 8
Dosiero : TAOISMO kaj propono de Universala Taoisma Stud-Ligo	p. 9
Okaze de la 400-jariĝo de la morto de Montaigne (F)	p. 17
Por la 100-jariĝo de Oomoto, prelego de K. Deguĉi (J)	p. 18
Pri Okcitanio kaj Kataroj, letero de Daniel Pfeiffer (F)	p. 20
"La Arbo de Amo" (1288) de M. Ermengaud (F, el la okcitana)	p. 21
Konvertiĝoj al Islamo en Nord-Norvegio (laŭ intervjuo)	p. 22
Unueco kaj Unikeco de la Kreinto, Muhammad Kahraman (Turkio)	p. 23
Bahá'u'lláh, recenzo okaze de la 100-jariĝo de lia morto	p. 24
Leteroj : M-ro György (R), Y.Yadede (Usono), J.Karhan (CS)	p. 26
Letero al la Papo, de Vasile Albu (rumana sekcio de IKUE)	p. 27
Pri kristanismo kaj aliaj religioj, C. Galeriu (Rumanio)	p. 27
Unua IKUE-kunveno en Rumanio (ortodoksa prez. elektita)	p. 27
Protokoloj de ASISTI-aj kunvenoj, B. Westerhoff (D)	p. 28
Pri la Religia Antologio, L. Nordenstorm (S) kaj Ch. Lavarenne	p. 28
Religia Literaturo en E-o (ekzemplo : Islamo), L. Nordenstorm	p. 29
"Citadelo" de Saint-Exupéry, tradukeroj de A. Mechelynck (B)	p. 30
Propono de agado pri esp. interrel. elsendoj de ORF, J.Karhan (CS)	p. 31
Ĉu certe okazos la UK 1994 en Seulo ? ... !	p. 31
Ĉio ŝanĝiĝas, sed nia spirito ĉiam vivas, Frances Howard (GB)	p. 32

# 500 - jariĝoj : 1. Ameriko

LETERO DE LA ĈEFO SITL, DE LA GENTO DUŬAMIŜ,  
AL LA USONA PREZIDANTO FRANKLIN PIERCE  
KIU VOLIS AĈETI LIAN LANDON (1855)

(...) Ne ludas gravan rolon, kie ni pasigos niajn lastajn tagojn : ili ne estos multaj. Kelkajn pluajn horojn, ankoraŭ kelkajn vintrojn, kaj neniu infano de la grandaj gentoj kiuj iam vivis sur tiu ĉi tero aŭ kiuj vagadis po malgrandaj grupoj tra la arbaroj, revenos por zorgi pri la tomboj de nia popolo kiu iam estis tiom potenca kaj plena je espero.

Ion ni scias, kion la blankhaŭtulo eble iam malkovros. Nia dio estas la sama dio. Vi eble opinias ke vi povas posedi lin laŭ la sama maniero laŭ kiu vi deziras posedi nian landon. Sed tion vi ne povas. Li estas la dio de la homoj. Kaj li havas sammulte da korinklino por la ruĝhaŭtulo kiel por la blankhaŭtulo.

La tero estas altvalora por li. Kaj vundi la teron estas montri malrespekton al ties kreinto.

Ankaŭ la blankhaŭtuloj malaperos, eble pli rapide ol aliaj rasoj (...)

Kiam la lasta ruĝhaŭtulo estos for kaj la memoro nur estos kiel la ombro de nuboj pasanta sur la herbejo, la spirito de mia popolo daŭre vivos en tiuj arbaroj kaj ĉe tiuj strandoj, ĉar ni amas la landon kiel la novnaskito amas la kortakton de sia patrino.

Se ni vendas al vi nian landon, amu ĝin kiel ni ĝin amis. Protektu ĝin kiel ni ĝin protektis. Neniam forgesu kia la lando estis kiam vi ekposedis ĝin. Kaj per via tuta forto, via tuta potenco kaj via tuta koro gardu ĝin por viaj infanoj, kaj amu ĝin kiel Dio amas nin ĉiujn.

Ion ni scias : nia dio estas la sama dio. Tiu ĉi tero estas altvalora por li (...)

## Alia 500-a datreveno : la elpelo de la Judoj el Hispanio

Toledo, centro de la sefarada kulturo en la 15-a jarcento, travivis la grandan reamikiĝon inter la hispana kaj juda gentoj. La ĉefaj gvidantoj de la monda judaro tie solenis la memoron de la elpelo de la judoj fare de la "Katolikaj Reĝoj" en 1492.

Sur la tero de siaj prauloj, Eduardo Toledano [tiele !] kaj milo da aliaj idoj de elpelitaj judoj spertis la emociion de la reakcepto, la senton de hejmen-reveno. La franca ĉefrabeno Jo Sitruk, ankaŭ sefarado, eldiris ke "la eliro de Toledo estas nur memoro ĉar la judoj hodiaŭ estas hejme en Hispanio".

Multaj simboloj de reamikiĝo : liberigo de 500 kolomboj, torĉoj "de la diasporo" ekflamigitaj en Toledo kaj portotaj al la sep ĉefaj landoj kiuj akceptis la sefaradojn. Dudeko da Toledano-j el la tuta mondo finfine ricevis de la urbestro ŝlosilon de la urbo. Laŭdire multaj tiamaj elpelitoj estis konservantaj la siajn...

## 14-a renkontiĝo de la internacia jud-katolika komitato en Baltimore (Usono) en majo 1992

Intervjuita de la katolika ĵurnalo "La Croix" (La Kruco), la Patro Jean Dujardin, sekretario de la franca episkopa komitato por la rilatoj kun judismo, unue deziris substreke rememorigi "la fortan katolikan aserton [konklude de la pripensado pri kontraŭsemidismo kaj Ŝoaho dum la antaŭa renkontiĝo en 1990] en Prago : neblas esti aŭtentike kristana kaj engaĝita en kontraŭsemidismo".

La renkontiĝo estis gvidata de S-ro Edgar Bronfman, prezidanto de la monda Juda Kongreso, kaj de la kardinalo Cassidy, prezidanto de la [ĉef]-pontifika komisiono por la rilatoj kun judismo, kiu deklaris ke la teŝuvaho (la pentofaro) konsistigas "la taŭgan respondon de la katolika Eklezio pri tiu tragika maltoleremagado" (la Ŝoaho, la preskaŭa ekstermado de la judoj fare de la nazioj).

Laŭ J. Dujardin, ambaŭ asertoj "kontribuos al la teksto de la Papo pri la Ŝoaho, ankoraŭ preparata".

"Estis granda simpatio inter la 80 partoprenantoj, sen ia ajn agresemo (...). Alia signo : la kardinalo Bernardin, ĉefepiskopo de Chicago [ĉikago], proponis la esceptan malfermon de la vatikanaj arkivoj al esplorantoj pri la periodo de la lasta koncilio kaj de la Ŝoaho. La peto estas kunsubskribita de ambaŭ partioj" ...do de la Vatikano.

( Laŭ intervjuo fare de Michel Kubler. )

# La dialogo inter religioj (sekvo)

## Dua tezo : Ĉiuj religioj baziĝas sur revelacio

Per tiu tezo mi rezolute eniras en teologiajn temojn kaj situigas min kiel liberala Protestanto. Diference de ortodoksaj fluoj de Judismo kaj Kristanismo, mi ne opinias ke estas ago kaj revelacio de Dio nur kaj ekskluzive en la biblia historio. Dio manifestiĝas ankaŭ aliloke. La bibliaj atestantoj foje diras aŭ lasas kompreni tion. Ekzemple Abram akceptas la benon de la pagana pastro Melkicedek, kaj donas al li la dekonacion. La sanktaj verkistoj, speciale tiuj kiuj estas nomitaj "sentencaj", inspiriĝis de la egipta saĝeco ; poste ili ĉerpas iranajn temojn. Komence de sia evangelio, Mateo rakontas ke magoj, t.e. pastroj de astra religio, venis viziti la infanon de Bet-Leĥem. La libro pri la Agoj de la apostoloj rakontas ke Paŭlo, en parolado en Listro, eldiras ke nenie Dio estas lasita sen atestanto, kaj en Ateno li mencias la dirojn kaj la aŭtorojn de la greka mondo.

Mi faros tri rimarkojn por precizigi la ekzaktan sencon kiun mi donas al tiu dua tezo, kaj por preventi eblajn miskomprenojn.

- **Unue** mi ne opinias ke ekzistas ĝenerala aŭ universala revelacio kiu estus la sama por ĉiuj homaj estaĵoj. Mi prefere kredas ke ekzistas multego da apartaj revelacioj. Ĉiu estaĵo, aŭ pli ekzakte ĉiu homa grupo, spertas la dian laŭ originala kaj specifa maniero tra propraj eventoj, personoj, mitoj aŭ ritoj. Kiam li revelacias sin, Dio ne parolas al ĉiuj ajn ; li alparolas precizajn personojn.

- **Due**, la revelacio ne konsistas en komunikado de scio. Ĝi estas ekzistenciala renkonto kun Dio. Ne estas revelaciita instruo aŭ, por diri alimaniere la saman, ne estas revelacio de doktrinoj. Estas evento, tiu de renkonto kie Dio ekprenas nin. Tiu ĉi eventon, aŭ tiujn ĉi eventojn, ni doktrine pensas, ni interpretas kaj esprimas per niaj doktrinoj. La doktrinoj estas la intelekta aŭ koncepta traduko de ekzistenciala travivaĵo.

- **Trie**, mi substrekas ke por mi ĉiu revelacio venas de Dio kaj ke ĉiam la homa estaĵo ricevas ĝin. Mi tute ne parolas pri natura kono kiun ni havas aŭ povus havi pri Dio per niaj propraj rimedoj. Ni ne malkovras Dion per niaj streboj, per nia inteligento, nia ago aŭ nia pio. Sed Dio decidas renkonti nin laŭ tia aŭ ĉi tia maniero: tio dependas de li, de lia movo, de lia iniciato; ne de mi.

Tiu dua tezo havas kiel konsekvencon ke neniu religio estas tute falsa nek tute aberacia. De ĉiuj, eĉ de la plej trosimpligaj kaj ambiguaĵoj, estas io ricevinda kaj lerninda. Tiu ĉi io ne nepre troviĝas en ilia eksplicita instruo, en ilia teologio ; ĝi pliprope situas en la origina sperto kiun la doktrino pli malpli bone kodigas.

## Tria tezo : Ĉiuj religioj misformas, malfidelas kaj difektas la revelacion sur kiu ili estas fonditaj.

Religio ne limiĝas je la revelaciiga sperto sur kiu ĝi estas fondita. Ĝi konsistas ankaŭ, kaj eble ĉefe, en la maniero laŭ kiu homa grupo akceptas, vivas kaj transdonas tiun fondigan sperton. La religio estas difinita per simbola strukturaro. Mi ĉi tie uzas "simbola"

en la senco de signifoplena, sencoriĉa, kaj ne en la senco de imaga, sen konkreta realeco. Tiuj simbolaj strukturoj (de la mitoj, ritoj, dogmoj, institucioj ktp.) havas du aspektojn. Unuflanke ili atestas la fondigan revelacion ; ili enskribas kaj enkarnigas ĝin en la homa realo. Sen ili la revelacio estas nedaŭra, malaperema, senefika fenomeno sen influo nek konekto kun la konkreto. Ili do respondas al necesiĝo. Aliflanke tiuj strukturoj difektas kaj malĝustigas la revelacion. Instituciigante la eventon ili samtempe tradukas kaj malfidelas ĝin, donas formon al ĝi kaj ĝin misformas, realigas ĝin kaj ĝin ŝanĝas.

Kial distordo neeviteble okazas ? Ĝi devenas de la distanco kaj de la diferenco inter la esto de Dio kaj la ideo kiun ni havas pri ĝi. Neniam estas ekzakta koincido ĉar Dio estas la transcenda, la radikale alia. La diseco ebligas ĉiajn ajn fortordojn, misformojn kaj kontraŭsencecojn. En la origina revelacio troviĝas elementoj kiuj, pro sia naturo, pro la dieco mem de Dio, estas nekapteblaj de homa konceptado aŭ vortigado. Tial estas parta neadekvateco de ĉiaj ajn niaj esprimformoj.

La homoj, foje pro troa pieco, en certaj kazoj pro superstiĉo, plej ofte pro senkonscia bezono ekkapti la dian, proprigi ĝin al si kaj igi ĝin utiligebla, emas forgesi tiun diferencon, ne kalkuli kun tiu distanco. Ili tiam absolutigas siajn religiajn strukturojn. Ili konfuzas la revelacion kun sia maniero traduki ĝin. Ili identigas Dion kun siaj doktrinoj kaj ritoj. Ili diigas kio atestas ja Dion, sed ne estas Dio. Ili falas en idolistecon, kiu ĉiam estas difektita veraĵo, kiel rememorigas al ni la antikva legendo kiu vidas en demonoj falintajn anĝelojn.

Tiu distordo estas trovebla en ĉiuj religioj, inkluzive de la diversaj jud-kristanismoj. Mi pensas ekzemple, kaj bonvolu senkulpigi min se mi vundas certajn el vi, pri la diigiteco de eŭkaristio en certaj fluoj de Katolikismo, aŭ pri la diigiteco de la biblia teksto en certaj fluoj de Protestantismo. Oni ne plu distingas la rimedon de la celo, la ilon uzatan de la vero, de la vero mem. Okazas demoniigo de la atestantoj kaj de la portantoj de la revelacio. Por uzi esprimon de Paul Ricoeur, ni havas simbolojn kiuj degeneras en idolojn.

Se la dua tezo signifas ke neniu religio estas tute falsa, la tria implicas, male, ke neniu religio estas komplete, tute vera. La religioj samtempe estas necesaj kaj danĝeraj, bonaj kaj malbonaj, pozitivaj kaj negativaj. En ili miksiĝas la vera kaj la malvera, aŭtentikeco kaj difektiteco, la dia kaj la demona. Ili ĉiam prezentas batalon inter la mesaĝo kaj la institucio, la revelacio kaj ties konkretiĝo, la Spirito kaj ties enkarniĝo. Temas pri elementoj dupolusaj, t.e. kiuj bezonas sian malon por ekzisti, kiuj trovas sian verecon kaj sian sencon nur en kontinuaĵoj streĉo kaj oponado. Se la konflikto ĉesas, la religio mortas aŭ perdas sian verecon, aŭ ĉar ĝi fariĝas pure etera kaj nereala pro forigo de la strukturoj, aŭ ĉar ĝi fariĝas pure formalista kaj konvencia per eliminado de la Spirito.

Viva religio ne estas karakterizata de paco, kvieto, harmonio, sed de konstantaj bataloj kaj polemiko.

# Ĉu estas falsaj religioj ?

La konkludo de la dua tezo de la antaŭa artikolo, en tio ke "neniu religio estas tute falsa nek tute aberacia", kongruas kun la deirpunkto de Emilo DURKHEIM, fama Profesoro ĉe la Pariza universitato, kvankam la vidpunktoj de kristana kredanto, teologo, kaj de universitata sociologo, necese estas tre malsamaj (ĉefe pri la nocio de dia revelacio, kiu ŝajnas tute ne aperi ĉe Durkheim).

Ni do tradukas ĉi-sube kelkajn eltiraĵojn el lia 28-paĝa enkonduko al lia majstra verko La elementaj formoj de la religia vivo\*.

Esenca postulato de sociologio estas tio, ke homa institucio ne povas baziĝi [longe] sur eraro kaj sur mensogo : se estus tiel, ĝi ne povus daŭri. Se ĝi ne estus fundamentita en la naturo de la realaĵoj, ĝi renkontintus en la realaĵoj rezistojn kiujn ĝi ne povintus superi.

En la studadon de (la primitivaj) religioj ni do eniras kun la certeco ke ili teniĝas je la realo kaj ke ili esprimas ĝin (...)

Certe, kiam oni konsideras nur la literon de la formuloj, **kredoj kaj religiaj praktikoj foje ŝajnas konsternigaj**, kaj oni povas senti emon atribui ilin al ia funda aberacio.

Sed, sub la simbolo, oni devas scii atingi la realaĵon kiun ĝi figuras kaj kiu donas al ĝi ties veran signifon. La plej barbaraj aŭ plej bizaraj ritoj, la plej strangaj mitoj, tradukas iun homan bezonon, iun aspekton de la vivo aŭ individua aŭ socia.

La kialoj, kiujn la fidelulo donas al si mem por pravigi ilin, povas esti - kaj eĉ plej ofte estas - eraraj ; sed la veraj kialoj tamen ekzistas. Malkovri ilin : jen la rolo de la scienco.

**Do ne estas, esence, religioj kiuj estas falsaj.** Ĉiuj estas siamaniere veraj : ĉiuj respondas, kvankam laŭ malsamaj manieroj, al donitaj kondiĉoj de homa ekzistado.

Certe, ne maleblas klasifiki ilin laŭ hierarkia ordo. Oni povas diri ke unuj estas superaj al la aliaj en tiu senco ke ili agigas pli altajn mensajn funkciojn, ke ili estas pli riĉaj je ideoj kaj sentoj, ke en ilin eniras pli da konceptoj, malpli da sensacioj kaj bildoj, kaj ke ilia sistemigo estas pli sciencoplena.

Sed kiom ajn realaj estas tiu kompleksa pligrandeco kaj tiu koncepta plialteco, ili ne sufiĉas por klasifiki la koncernajn religiojn en apartajn generojn.

**Ĉiuj egale estas religioj (...)** Ili respondas al la samaj necesoj, ili ludas la saman rolon, ili dependas

de la samaj kaŭzoj ; ĉiuj do povas esti same bone uzataj por evidentigi la naturon de la religia vivo kaj, sekve, solvi la problemon kiun ni intencas pritrakti (...)

Ĉar se utilas scii en kio konsistas tiu aŭ ĉi tiu aparta religio, ankoraŭ pli gravas scii kio estas religio, ĝenerale : jen la problemoj kiu, ĉiuepoke, vekis la scivolemon de la filozofoj, kaj ne senprave ; ĉar ĝi interesas la tutan homaron.

(...) Ĉar ĉiuj religioj estas kompareblaj, ĉar ili ĉiuj estas specioj el sama genro, necese sekvas, ke estas esencaj elementoj kiuj estas komunaj al ili.

Per tio ni ne volas paroli nur pri eksteraj kaj videblaj karakteroj kiujn ili prezentas ĉiuj egale, kaj kiuj ebligas doni, ekde la komenco de la esplorado, provizoran difinon de religio ; la malkovro de tiuj malkaŝaj signoj estas relative facila, ĉar la observado kiun ĝi postulas ne bezonas transiri la supraĵon de la realaĵoj. Sed tiuj eksteraj similaĵoj implice supozigas aliajn kiuj estas profundaj.

Ĉe la bazo de ĉiuj sistemoj de kredoj kaj de ĉiuj kultoj, devas esti certa nombro da fundamentaj mondbildoj kaj ritaj teniĝoj kiuj, malgraŭ la diverseco de la formoj kiujn unuj aŭ la aliaj povis alpreni, havas ĉie la saman objektivan signifon kaj ĉie plenumas la samajn funkciojn.

Tiuj konstantaj elementoj konsistigas **kio estas eterna kaj homa en la religio** ; ili estas la objektiva enhavo de la ideo kiun oni esprimas kiam oni parolas pri la religio ĝenerale.

[ Fine, jen lia difino de religio : ]

Religio estas solidara sistemo de kredoj kaj praktikoj rilataj al sanktaĵoj - t.e. apartigitaj, malpermesitaj aĵoj - en kiu la kredoj kaj praktikoj unuigas en saman moralan komunumon, nomitan Eklezio, ĉiujn kiuj aliĝas al ĝi.

\* Les formes élémentaires de la vie religieuse, Paris : Félix Alcan, 1925 (2a eld., 647 p.) , p.3-4, 6 kaj 27.

(Interŝanĝa anonco)

LA JAPANA BUDHANO

N-ro 260 SEPTEMBRO-NOVEMBRO 1992

ENHAVO

真昼の月-----石黒 漢子-----1
観無量寿経から-Amitajur Djana Sutro-浅野 三智-----2
Enkonduko al Sanskrito-----8
Pri Atombombo en Nagasaki-----高原 憲-----11
勝鬘経 Granda Parolado de Śrimalo---出谷 根庵-----16
関西大会仏教分科会-----西 泰宏-----19
Enhavo de ASISTILO-----20
Bonzo el Koya -----IZUMI Kyoka-----21
お便りから--El Leteroj-----23
目次, El Redakcio -----25

目次

## EKUMENA KONSILIO DE LA EKLEZIOJ : K. RAISER, NOVA ĜENERALA SEKRETARIO

La urugvaja metodista pastoro Emilio Castro finos sian funkcion kiel ĝenerala sekretario de la Ekumena Konsilio de la Eklezioj (EKE) la 31-an de decembro 1992. El la kvin homoj aŭditaj fine de junio de la antaŭelekta komitato de EKE, estis elektita fine de aŭgusto en Ĝenevo la germana luterano Konrad Raiser.

### Itinero

Filo de partoprenanto en la monda Konferenco pri Eklezio kaj socio en Ĝenevo en 1966 kaj en la Asembleo en Upsalo en 1968, Konrad unue intencis esti luterana pastoro en Ekvadoro. Edziĝinta, patro de kvar infanoj, li fakte havis sian unuan pastran sperton en industria medio en Germanio (1963-65).

Post studoj pri teologio, interalie en Tübingen, pri sociologio kaj socia psikologio en Harvard, kaj unua posteno kiel asistanto pri praktika teologio en Tübingen (1967-69), li estis vokita al la Ekumena Konsilio en Ĝenevo.

Tie li okupis dum kvar jaroj la postenon de sekretario por la studoj ĉe la Komisiono "Kredo kaj Konstitucio". En 1973 li fariĝis ĝenerala vicsekretario de EKE (ĝis 1983), kaj tiam profesoro pri teologio en Bochum kaj direktoro de la Ekumena Instituto de tiu ĉi universitato.




Foto: P. Williams/WCC Photo

Por li la ekumena Movado troviĝas en decidiga momento de transiro. Nun venis la tempo ŝanĝi la modelon, la "paradigmon" kiel la scioplenuloj hodiaŭ diras (...) Ĝis ĉ. 1968, ekumenismo centriĝis al Kristo, al la Eklezio, kun universalisma perspektivo pri la misio kaj la historio. La unueco povis fariĝi nur en la konfeso de Kristo Savanto.

### Vidmaniero

Por li la ekumena Movado troviĝas en decidiga momento de transiro. Nun venis la tempo ŝanĝi la modelon, la "paradigmon" kiel la scioplenuloj hodiaŭ diras (...) Ĝis ĉ. 1968, ekumenismo centriĝis al Kristo, al la Eklezio, kun universalisma perspektivo pri la misio kaj la historio. La unueco povis fariĝi nur en la konfeso de Kristo Savanto.

Sed tiu ĉi perspektivo pri ekumenismo estis skuita de la ekkonsciiĝo pri religia plureco, mondaj konfliktoj, ekologia problemoj kaj diverseco en la Eklezio. De tiam la reliefigiteco translokiĝas de la "unueco" al la "kuneco" de la Eklezio. Kun zorgo pri la respekto de la diferencoj. De la kosma Kristo oni revenas al la historia Jesuo kiu anoncas la dian regnon, kaj al la laboro de la Spirito en la tuta kreitaro (...)

Laŭ Raiser la ekumena vokiteco daŭre estas transformi la loĝatan teron en domon de Dio.

(Laŭ artikolo de Bruno Chenu en La Croix, 28-8-1992.)

## KONSEKRADO DE LA XVII-a KARMAPA ĉefo de la tibetbudhista kagju-a tradicio



La 27-an de septembro, la posteulo/reenkarniĝo de la XVI-a Karmapa (forpasinta en 1981 \*), kiu plenumas la saman funkcion kiel la

Dalai-Lamao sed por alia branĉo de la tibeta budhismo - tiu, plej malnova, de Tilopa, Naropa (hindoĵ), Marpa (1012-1098), Milarepa, Gampopa kaj la sinsekvo de la Karmapa-o(j) - estis surtroniĝita apud Lhasao, en sia monaĥejo Tsurphu (ekde 1189 la sidejo de la kagju-anoj, kvankam la XVI-a Karmapa, fuĝante en Hindion, fondis novan ĉefmonaĥejon en Rumtek (Sikimo).

Laŭ la novaĝ agentejo Nova Ĉinio, la komunistaj aŭtoritatoj partoprenis en la ceremonio kaj donis al la 8-jara infano lian ateston "aprobantan la reenkariniĝon". (Aprobo decidita, la 27-an de junio, de la buroo pri religiaj aferoj en Pekino : tia subteno de la ĉina registaro estas la unua depost la invado de Tibeto en 1950-51.)

Iom antaŭe, alia reenkariniĝo de granda Rimpoĉhe ("Valorega" Lamao) de la sama branĉo, la venerinda Kalu Rimpoĉhe (vidu artikolojn en Asistilo n-ro 3), estis ankaŭ rekonita en la monaĥejo Rumtek (Sikimo), i.a. de la Dalai-Lamao.

\* Mi mem, tiam studento ĉe la Kalkuta Universitato, havis la feliĉan fortunon povi ĉeesti dum ok tagoj en la nova monaĥejo Rumtek (Sikimo) la ĉefajn ceremoniojn akompanantajn la kremacion de lia korpo en la ĉeesto de la venerinda Kalu Rimpoĉhe, dekoj da Lamaoj de diversaj tibetaj tradicioj kaj ĉirkaŭ 10.000 fideluloj (el kiuj centoj venis kontraŭleĝe de Tibeto, piede tra la landlimaj montaroj).

# Homrajtoj

**TIBETO : Alvoko al la Unuiĝintaj Nacioj, al la organizoj por la defendo de homrajtoj... Ni (...) la politikaj malliberigitoj de la prizono Drapĉhi, norde de Lhasao, deziras turni vian atenton sur la jenajn faktojn (...):**

Ni, politikaj malliberigitoj, ne estas traktitaj kiel homoj sed kiel bestoj. Eĉ kiam ni estas malsanaj kaj malfortiĝintaj, ni devas labori nudpiede sur tranĉaj ŝtonoj (...)

Ene de la [labor]barakaroj, politikaj malliberigitoj estas punataj [ekzemple jene :] Gardistoj armitaj per elektraj bastonoj, devigas ilin kuri (...)

Ngauang Tengpa, monaĥo de la monaĥejo "Drepung", estis arestita en 1989. (La ĉina polico estis trovinta ke li havis skribaĵojn favorajn al sendependeco). Li rompis sian genuon kurante sur tranĉaj ŝtoneroj dum sia mallibertempo. Li nun estas enŝlosita en la sekcio kvina de la prizono Drapĉhi.

En certaj okazoj la gardistoj, kolerantaj kontraŭ la malliberuloj, trudis ilin senĉese kuri de la 2-a ĝis la 7-a. La malliberigitoj kiuj ne povis kuri estis pikinstigitaj per elektraj ekscitegoj kaj aliaj rimedoj. Deknaŭjara monaĥo, Daŭa, de "drhala Lüpük" en Lhasao, estis severe punita ĉar li ne estis kapabla kuri. (Li estis arestita en 1989 pro posedo de tibeta nacia flago).

Ankaŭ al la maljunaj kaj malfortiĝintaj malliberigitoj oni trudis kuradon en plena tagmeza suno. Multaj vomis sangon dum tiu ĉi puno. (...)

Al la jenaj malliberigitoj de la sekcio kvina, ĉelono-ro 1, oni trudis kuradon kun pezaj ŝtonblokoj sur siaj ŝultroj : Daŭa Ŭangdu de la templo Tsug Lhakang, Ngadüp kaj Dondüp Dorĝe de Lhasao, Ĉoeden de Lhoka. Ĉiu signo de hezito estis severe punita per elektraj ekscitegoj kaj aliaj batoj. (...)

Neniu politika malliberigito ricevas la necesajn medicinajn flegadojn. Oni permesas al ni, po unu fojon semajne, iri al la flegejo ; sed tie ni estas traktitaj kiel bestoj.

Estaj plej seriozaj duboj pri la kuracadoj kaj injektaĵoj al kiuj ni estas elmetitaj. Laŭdire la aŭtoritatoj miksigas toksojn kun la medicinaĵoj. Nia nacia heroo Lhagpa Tsering estis nokte murdita per injektaĵo de tokso la 14-an de decembro 1990.

La 15-an, por honorigi la ĵusan mortinton, ĉiuj politikaj malliberigitoj decidis malsatstrikon en Drapĉi, sed la gardistoj eniris la ĉelojn kaj violente batis la enŝlositojn (...)

Tial ni, politikaj malliberigitoj de Tibeto, humile petegas vin helpi nin, ĉar niaj vivoj estas reale endanĝerigitaj. Kun le preĝoj de [la enŝlositoj en] la politika apartaĵo de la prizono Drapĉhi, kiu[j] urĝe esperas vian agadon.

El La lettre du Tibet n-ro 7 (majo 1992); 2 rue d'Agnou, F-78580 Maule, Francio.

Vidu ankaŭ en Asistilo n-roj 3 kaj 5

## MORTKONDAMNITAJ PRO BLASFEMADO

Laŭ novaĵagentejo Reuter, en Pakistano (Panĝabo), tribunalo kondamnis kristanon al morto, la 2-an de novembro, pro blasfemado. Tiu verdikto estis eldirita kontraŭ S-ro Gill Masih, deklarita kulpa je profanado de "la sankta nomo de l'Profeto".

La akuzito estis arestita fine de 1991 sekve de privata plendo. Blasfemado tiam estis punebla per dumviva mallibereco. Sed la pakistana parlamento voĉdone aprobis en julio leĝon kiu preskribas por tia kazo la mortpunon post rekomendo de la islama tribunalo. S-ro Masih estas la unua persono kondamnita je morto de post tiam. Li tamen ankoraŭ povas apelacii.

Kaj la saman tagon la irana ĵurnalo "Jomhuri Eslami" anoncis ke la rekompenco, jam de du milionoj da dolaroj, por tiu kiu estos murdinta la britan verkiston Salman Rushdie, estis ankoraŭ plialtigita "pro la sensacia kampanjo de la germana gazetaro postulanta la nuligon de la Fatŭa" (religia dekreto) de la imamo Khomeiny kiu estis kondamninta lin al morto en 1989 pro blasfemado. ( Sed ŝajnas ke la dia justeco malsame decidis, ĉar la unua kiu mortis tamen estis Khomeiny.)

Reage al tiu plialtigo, reprezentanto de Foreign Office (la brita Ministrejo de la Aferoj Eksterlandaj) deklaris : "Tio estas netolerebla atenco kontraŭ la homrajtoj".

( Laŭ informoj el "Le Monde", 5-11 kaj 4-11-92, p.6 )

La ajatolah Hassan Sanei, kiu prezidas la "Fonduson" starigitan por pagi la eventualan murdinton, precizigis en la irana ĵurnalo "Abrar" (je 11-11-92) ke, se la verdikto estontus plenumita de membroj de la familio de la verkisto, la rekompenco estus ankoraŭ pli alta. (Laŭ la novaĵagentejo Reuter).

Cetere eĉ la ĵus eldonita Universala Katekismo de la katolika Eklezio ("promulgota" en Romo la 8-an de decembro) akceptas la uzon de mortpuno :

" Gardi la komunan bonon de la socio postulas senkapabligi la agresanton krimi. Ĉi-motive, la tradicia instruo de la [katolika] Eklezio rekonis la pravecon de la rajta publika aŭtoritato puni proporcie al la graveco de la delikto, senekskluzive, en ekstreme gravaj kazoj, de mortpuno."

Ĉu tio ne riskas iel pravigi eĉ la du supremencitajn krimojn kontraŭ la homrajto je libereco de opinio ? Ĉar certe ja, blasfemado, por multaj islamanoj, estas "ekstreme grava kazo" !

Strange ke en la Biblio mem, tamen estas skribite "Ne mortigu" (Eliro 20,13; trad. de Zamenhof), kaj ke tiu absoluta admono eĉ enviciĝas inter la Dek Ordonoj (devigaj ankaŭ por ĉiu kristano)...

# Katolikaj teologoj malpermesitaj

## DREWERMANN (Germanio)

La germana pastro Eugen Drewermann ricevis malpermeson de sia ĉefepiskopo :

- instrui teologion ĉe katolikaj fakultatoj (sed li daŭrigas la saman instruon sub rubriko "sociologio" ĉe ŝtata universitato) ;
- prediki (sed spite tion li tamen gvidas ĉiusabate "celebradon de la Parolo", kiun ĉeestas pli ol milo da homoj);
- kaj provizore, plenumi siajn sacerdotajn funkciojn (sed li, ĉiukaze, jam rezignis ilin, kelkan tempon antaŭe).

Malgraŭ (aŭ ĝuste pro) tio li fariĝis la plej sukcesa teologo en Germanio. Lia libreto kontraŭ la kutima katolika koncepto pri sacerdoteco, "Kleriker" (La Klerikoj) jam vendiĝis 175.000-ekzemplere ; ĉar, kiel li skribis en publika letero al sia ĉefepiskopo : "Dum 25 jaroj mi strebis por ke la homoj forgesu la "ĉinan" [esprimo por: ĵargonon] de mia korporacio", pensante ke oni devas "redoni kion oni hodiaŭ nomas teologio, al la strata homo".

Kio estas riproĉita ? Oficiale :

- Ke li dubas pri la neceseco de la fraŭleco de la pastroj, [ kiu cetere estas deviga nur ekde cirkaŭ la 10-a jc. kaj nur en la latina parto de la katolika Eklezio : edziĝintaj fideluloj de la "orientaj ritoj" (Maronit-oj, Melkit-oj, ktp.) rajtas ankoraŭ nun fariĝi katolikaj pastroj ] ; kaj de la malpermeso pri sacerdotiĝo de virinoj [kiun cetere ankaŭ la Sinodo de la Eklezio de Anglio, la teologie plej proksima de la katolika, ĵus aprobis la 11-an de novembro].
- Ke li neas la virgecon de Maria : "la rakontoj pri la devirga naskiĝo de Jesuo, plejparto el liaj mirakloj, liaj malsuprenirado al la inferoj kaj suprenirado al la ĉielo, kaj eĉ la malkovro de la malplena tombo la Paskan matenon, devas kompreniĝi nur kiel romanoj, legendoj aŭ mitoj". Ĉio estas laŭ li simbola anstataŭ (nur) historia, ĉar "estas veraĵoj kiujn oni povas esprimi nur per simboloj".
- Ke laŭ li, en multaj kazoj abortigo estas malpli granda malbono ; kaj ke li batalas por ke la denove edziĝantaj eksedziĝintoj rajtu partopreni en la komunio.
- Kaj ke li senprobleme kaj praktike akceptas la "interkomunion", t.e. partopreno de kristanoj el malsamaj konfesioj en la sama komunio (kutime tolerita nur en esceptaj kazoj, ekzemple ekumenaj renkontiĝoj, post permeso de la loka episkopo).

Sed eble ĉefe (kvankam neoficiale) :

- "Lia pli kaj pli agresema kritikado de la Eklezio en kiu ŝajnas ke li vidas nur malbonuzadon de povo kaj fonton de neŭrozo" (Nathalie Bayer). Li riproĉas al ĝi ke ĝi pravigis militojn kaj detruadon de la natura cirkaŭaĵo dum jarcentoj.

- Lia interpretado laŭ psikanalizo "kvazaŭ tiu sistema ideologio, reviziita de Jung, estus la lasta vorto de scienco" (Etienne Borne, kiu uzas la esprimon "psikanaliza teologio")\*.

- Kaj ke "tiu nekonformismo, tiu vegetarana-ekologiisto-en-sandaloj, kiun oni vidis dum la ĉeGolfaj militoj fariĝi improviziita oratoro de la pacifistoj en Paderborn, vivas en malmultekosta loĝejo, sen televido, sen fridujo kaj sen aŭto ; kaj en malriĉeco kiu ne estas supraĵa..."

## Leonardo BOFF (Sud-Ameriko)

La dua teologo estas la sudamerikano **Leonardo BOFF**, la patro de la "teologio de la liberigo", kiu ĉi-aŭtune finfine decidis mem ekŝiĝi de la franciskana ordeno pro troeco de premoj kontraŭ li : inter alie oni longe malpermesis al li instrui kaj publikigi ian ajn skribaĵon.

## Angelo DURANTI (Esperantio, Italio/Greklando)

Kaj tria pastro kondamnita estas **nia samideano Prof. Angelo Duranti**, eksa prezidanto de Tutmonda Ekumena Ligo (T.E.L.), kiun "M-ro Luizo Amaducci, Arkiepiskopo de Raveno, minacis elstrecki el la pastraro (...) se li ne estus ekŝiĝinta de la Prezidanteco de T.E.L., pro subtenado de ekumenismo nedependa de la Katolika Eklezio-instrukcioj, minaco poste konkrete efektivigita la 15-an de Februaro 1992, kvankam jam en Oktobro 1991 li estis ekŝiĝinta de tiu posteno (...)" (Ekumenismo numero 20, marto 1992, p.332).

Kvankam en Asistilo n-ro 9 mi publike subtenis mian kolegon (daŭre Respondeca Direktoro de la trimonata esperantlingva gazeto Ekumenismo kiu reproduktis nian subtenon samloke), mi finfine ne plu scias kion opinii, pro reciproka akuzo pri mensogo. Al nia leganto Germain Pirlot, katolika instruisto, kiu (franclingve) skribis al M-ro Amaducci :

" (...) Mi estas konsternita antaŭ tia maltolero kiu, laŭ mi, estas en nekontestebla kontraŭdiro kun la mesaĝo de paco kaj de amo de Jesuo Kristo (...) Kiun pekon oni povas fari dialogante kun protestantoj, islamanoj, ortodoksuloj aŭ budhistoj ? Mi aŭdacas esperi ke temas pri misinterpreto de via penso (...)"

tiu ĉi respondis la 3-an de februaro 1992 :

" (...) Via espero estas nesenbaza. Temas pri misinterpreto de mia penso. La dokumento publikigita en Ekumenismo n-ro 19, p.307-308, ne estas aŭtentika. Kun mia "distingita konsidero"."

Mi do volas daŭre esperi ke ĉio pliboniĝos klarigante, kaj ke la "feliĉa solvo de TEL-krizo", (jam anoncita de Ekumenismo!), fine povos efektiviĝi.



Racia

# Taoismo

## ENKONDUKO

Estas en la mondo filozofio aŭ religio praaĝa, kiu dum jarmiloj instruis, ke homo estas parto de naturo kaj ke naturo estas dieca. Ĝi estas pensaro, kiu havis siajn originojn en primitiva religio kaj disvolviĝis laŭ la preceptoj de subtilaj metafizikistoj kaj poetoj. Ĝi estas doktrino, kiu kuraĝigis racian sciencan pensadon kaj samtempe nutris diversajn altajn artojn. Ĝi estas *taoismo*.

Taoismo naskiĝis en la pratempo de la Ĉina civilizacio, kiel formo de ŝamanismo. Poste ĝi estis raciigita de tiaj filozofoj kiaj Lao-tzu kaj Chuang-tzu antaŭ 2500 jaroj en la Chou Dinastio, kaj sekve ĝi elfloris en multajn branĉojn. Ĝi donis la bazon al Ĉina medicino kaj ĥemio, kaj egale al la pejzaĝa pentrado kaj romantika poezio. Eble la plimulto de la kulturaj manifestaĵoj, kiuj allogas la atenton de la tuta mondo al Ĉinujo, havas siajn radikojn en taoismo.

Tiu ĉi broŝuro provos ekspliki la heredaĵon de la taoismo, kaj ĝi ankaŭ aŭdacos demandi: *Ĉu ne la taoismo estas doktrinaro kaj viv-maniero, kiu povos fari pozitivan kontribuon al la monda homa civilizacio de la 21-a jarcento?*

## LA HISTORIO DE TAOISMO

Taoismo ne estas simpla fenomeno. Ĝi enhavas tutan movadaron, kiu disvolviĝis dum pli ol tri jarmiloj. Filozofiaj, religiaj, estetikaj, politikaj, militaj, sciencaj kaj pseŭdosciencaj elementoj ekzistas aŭ ekzistis en taoismo, kaj sub

ĉiu kategorio ekzistas malsamaj skoloj kaj sektoj, ofte kun nekongruaj doktrinaj detaloj kaj celoj.

Oni ofte distingas inter la taoisma filozofio, la Doktrino de Lao-Chuang (t.e. Lao-tzu kaj Chuang-tzu), kaj la taoisma religio, la Doktrino de Huang-Lao (t.e. Huang-ti, la mita Flava Imperiestro, kaj Lao-tzu). Tamen adeptoj de la religio malkonsentas al tiu ĉi divido, ĉar oni ofte faras la distingon nur por kondamni la religion kiel koruptan superstiĉon. Fakte la praktikado de diversaj aspektoj de taoismo povas okazi en la sama taoisto, kaj rigida divido ne konformas al la faktoj.

Unu aspekto de taoismo devenas de la praaĝo de Ĉina civilizacio, kaj parte similas al ŝamanismo, kvankam poste ordinaro estis distingo inter veraj ŝamanoj kaj veraj taoistoj. Unueco kun naturo kaj komunikado kun spiritoj estis gravaj. Kulto de la senmortuloj (*hsien*), kiuj supozeble loĝis sur insulo en la maro, donis la koncepton de la senmortulo al posta taoismo, kaj oni provis plilongigi la homan vivon unue per herbaj medikamentoj, kaj poste per mineralaĵoj. Sed maraj ekspedicioj elsenditaj de la imperiestroj ne sukcesis trovi la insulon, kaj poste oni supozis, ke la senmortuloj vivas en la montoj kaj foje en la homa socio.

Lao-tzu (604 AKE [Antaŭ la Komuna Erao] au 240 AKE) estas eble la plej respektita figuro en taoismo. Li filozofias pri la Tao aŭ Vojo, pri ne-agado (*wu-wei*), kaj pri la taoisma regado de la lando. Iuj interpretas lin metafizike, iuj mistike kaj iuj politike. Ni povas diri certe, ke etike li kuraĝe atakis militon, hipokritecon, la mort-punon kaj altajn impostojn.

Chuang-tzu (4-a jarcento AKE) estas unu el la plej literature brilaj filozofoj en mond-historio, certe tiurilate egala al Platono. Li skribis pli multe pri taoismo kaj la individuo, kaj emfazis la liberecon de ĉiu sekvi sian propran naturon.

Post Lao-tzu kaj Chuang-tzu, kiuj vivis en la Chou Dinastio (1122 AKE —255 AKE),

estis iuj aliaj filozofoj, ekzemple Huai Nan-tzu, nevo de la Han Dinastia imperiestro Han Ĉing-ti (156—140 KE (Komuna Erao)). Sed pli interese estas la Neo-taoistoj post la falo de la Han Dinastio.

Unu grupo el la Neo-taoistoj, el kiuj la plej elstaraj estis Wang Pi (224—249) kaj Kuo Hsiang (221—c. 300), deziris reinterpreti la doktrinojn laŭ maniero, kiu permesos al ili servi aktive en la publika vivo de la lando sen malkongruo kun la doktrino de ne-agado. Ili vere supozis Konfuceon esti pli bona taoisto ol Lao-tzu, ĉar li evidente jam mastris la sekretojn de la Tao kaj do ne devis paroli pri ili!

Aliflanke, inter la Neo-taoistoj ekzistis la Pura Konversacia Skolo, inter kies proponantoj estis la famaj Sep Saĝuloj de la Bambusa Bosko. Ili disvolvis viv-manieron bohemian kaj natur-amantan. La taoisma poezio, drinkado, romantikismo, naturalismo kaj eĉ nudismo estis praktikoj kaj idealoj de tiu ĉi saĝularo.

La eklezia taoismo ekfloris ĉirkaŭ la fino de la Han Dinastio. Chang Ling (mortis inter 157 kaj 178) estis la unua « Taoisma Papo » (la lasta malaperis en la unua duono de la 20-a jarcento, post vizito de komunistma armeo al sia sidejo), kaj Chang Ĉueh, kies T'ai-p'ing Tao (Vojo de la Granda Paco) rezultigis la T'ai-p'ing Ribelon (au Ribelo de la Flavaj Turbanuloj) en la jaro 184.

Estis tiuperiode du grandaj taoismaj eklezioj, la Orienta Eklezio kaj la Okcidenta Eklezio. Ambaŭ estis fonditaj de fid-resanigistoj kaj havis amasajn organizaĵojn kaj pastrojn. Ili ankaŭ ambaŭ emis forpreni de la imperiisma registaro la funkciojn de administrado. Tiurilate ili estis dum kelkaj jaroj tre sukcesaj, kaj la ekleziaj regimoj estis humanaj kaj efikaj. Tamen en 215 la Han Dinastio akceptis la kapitulacion de la lastaj T'ai-p'ing ribelantoj, kaj poste la eklezioj ne plu havis politikan kaj militan potencon.

La eklezia religio, tamen, daŭre ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas, kvankam ĝi nun estas tre dividita inter multaj sektoj kaj skoloj. Ankaŭ ekzistas novaj taoismaj kultoj, el kiuj eble la I-kuan Tao, vegetarisma, spiritisma kaj sinkretisma sekto, estas la plej interesa.

Samtempe kun la pure filozofiaj kaj religiaj disvolviĝoj de taoismo, ankaŭ ekzistis alia fadeno en la taoisma stofa: la alĥemiaj kaj intern-alĥemiaj sistemoj. La taoisma serĉo por plilongigo de la homa vivo komencis per la uzado de herboj, sed poste oni provis krei « pilulon de

## TAOISMO KAJ LA DOLĈA VIVO

Estas fama simbola pentra temo en Ĉinujo: tri saĝuloj, kiuj reprezentas la tri Grandajn Vojojn de Ĉinujo sidas ĉirkaŭ ujo da persik-vino. Ili estas Konfuceo, Ŝakamunio (la Budho) kaj Lao-tzu. Ili gustumas la vinon. Unu deklaris ĝin amara, alia acida. Tamen Lao-tzu gustumis ĝin kaj trovis ĝin – dolĉa.

La signifo estas sufiĉe evidenta: la budhismo same kiel la hinduismo konsideras la ordinaran homan vivon kaj mondon esti venkita kaj transcendita per la atingo de nirvano. Konfuceismo ja konsideras la mondon kaj homan vivon esti bonaj, sed tre severe disciplinas la vivon laŭ pezaj devoj kaj antikvaj principoj kaj sklavigas la junajn al la maljunaj kaj virinojn al viroj.

Sed la taoismo trovas la naturan mondon kaj ordinaran homan vivon esti mirindaj kaj valorplenaj. Ĝi ne supozas, ke oni devas iel « savi » homojn; ĝi kontentas sin per simpla natura plibonigo kaj remalkovrado de la esenca kaj origina bono kaj belo de ekzisto.

Tio nepre ne signifas, ke ĝi neas la realecon de homa (au besta) sufero kaj doloro. Al la taoisto la mondo estas reala kaj ties problemoj realaj. Tamen ĝi emfazas raciajn kaj mense sanajn manierojn, por helpi nin kaj aliulojn iompostiome; ĝi ne emas deklari krizon kaj magian solvon.

La flavoro de taoismo do estas optimisma, realisma kaj milda. Ĝi helpus la mondon per kvieteco, ne eksciteco, kaj kiam ĝi agas, ĝi agas kvazau neagade.

senmortaleco » per alĥemiaj metodoj el mineralaj ingrediencoj. Ĉi tiu eksperimentado mortigis eĉ imperiestrojn, kaj poste estis pli da intereso pri jogismaj metodoj de interna purigado kaj cirkulado de la viv-energio ene de la homa korpo. Estis kelkaj skoloj de tiaj praktikantoj; iuj simple deziris plilongigi la vivon, dum aliaj intencis fabriki spiritan animon, kiu je morto povos forflugi vivante de la morta korpo. Kompreneble, ankaŭ ekzistas minimume ekde la tempo de Chuang-tzu la uzadon de korpaj ekzercoj similaj al joko aŭ moderna tajĝiĉuano.

Ni ne povas fini la historion de taoismo en Ĉinujo sen mencio de budhismo. La plej tipa formo de la Ĉina budhismo estas la Ch'an Skolo (*Zen* en la Japana kaj *Sŭn* en la Korea). La naturamo kaj intuitivismo de tiu ĉi skolo estas esence

taoismaj, kaj tiu ĉi zenismo estas tre alia en sento de la Hinda budhismo pro tiu influo. Kvankam estis religio-politikaj disputoj kaj persekutoj inter taoistoj kaj budhistoj en la Ĉina historio (kiuj ne estas laŭdindaj por iu el la du religioj), ĝenerale ĉiam estas ĉi tiuj du Ĉinaj religioj, kiuj plej bone komprenas kaj prunteprenas unu de la alia.

La taoismo donis grandan impeton al scienco, aparte ĥemio kaj medicino, sed ĝi ankaŭ havas la precipan influon sur la Ĉina natur-poezio kaj natur-pentrado. Te-trinkado, vin-drinkado, la militaj artoj, ĝardenado kaj meditado ĉiuj ricevis nutron de la taoismo. Ĉio en Ĉina socio, kiu estas naturisma, romantika, individualisma aŭ pure estetika estas esence taoisma.

La peza konfuceismo kun sia ofte nehumana kaj troa emfazo ĉe la familio, la ŝtato, kaj senĉesa studado de la « ĝustaj » libroj estas tre laŭlitera kaj disciplinema pensmaniero; kiam ajn la Ĉino deziras spiritan freŝan aeron, estas la taoismo, al kiu li turnas sin. Oni povas esperi, ke ankaŭ la restaĵo de la mondo trovos tiun ĉi refreŝigon.

## TAOISMAJ ETIKOJ

Okcidentaj kuracistoj havas proverbon latinan: « *Primum non nocere* », « Unue, ne malutili ». Tiu ĉi maksimumo havas taoisman senton. La Taoismo provas ĉiam unue ne malutili al aliaj vivaĵoj per agado misdirektita au kontraŭ-natura. Tiu ĉi doktrino nomiĝas « *wu-wei* » au « ne-agado ».

Sed ne-agado ne vere signifas, ke la bona taoisto fakte faras nenion ajn. Ĝi signifas, ke la taoisto ne faras kontraŭ-naturajn agojn, kaj tio signifas, ke li estas esence ne-agresema; li ne deziras rompi la naturajn ligojn de kunsentado kaj simpatio inter li kaj aliaj homoj kaj vivuloj.

La *Tao-te Ching* donas konsilon eĉ pri militaj aferoj; Lao-tzu mem ne estis absoluta pacifisto au kvietisto. La taoisto rajtas agi entuziasme kaj forte—sed li konsideras zorgeme kaj ĝisfunde antaŭ ol li saltas en agadon, li ne agas nur por agi, kaj li ne agas nur pro timo de ne-agado. Kaj li pripensas ĉiam la homan koston de sia agado, aparte se ĝi estu milita.

Laŭ la etika sistemo de Taoismo, la homo estas origine bona estaĵo kun naturaj sociaj instinktoj kaj kapablo por kunsentado kaj kompatio. Estas la kontraŭ-naturaj konvencioj,

kiuj korpigas la individuon. Ideoj, ke la homo havas devojn rilate al obeemo al gepatroj kaj la familio/tribo/nacio, kiam ili estas imponitaj sur la kreskanta infano, kreas agresemon reage.

La taoisto kredas, kompreneble, ke la maljunuloj devas gvidi la junulojn, kaj ke la kunlaborado de la infanoj tiurilate estas dezirinda. Tamen li ne predikas pri la *devo* ami au obei iun ajn; li simple postulas ĝin sur kombinaĵo de la vera bazo en rilata forteco, amo flanke de la gepatroj, kaj prudento. Se la infano ne sentas premon ami kiel postulon, au obei kiel virton, li nature emos ami kaj kunlabori, kaj la rankoro kaj hipokr teco kreitaj de moralaj postuloj mankos.

La taoisto provas rigardi ĉiujn moralajn kaj etikajn demandojn kun puraj kaj naturaj



Lao-tzu

okuloj, okuloj ne plenaj de la malbona scio. La taoisto ne hezitas paroli pri virto kaj bono, kaj pri sia deziro por tiuj, kaj pri sia konvinko, ke li estas nature kaj aktuale vera bonulo. Sed tio estas tute alia afero ol aroganteco, kiu estas absolute anatemo al taoismo.

Ĝi estas simpla agnosko de la fakto, ke homoj estas nature bonaj, kaj ke boneco estas iom facile atingebla, kaj ne afero por malmultaj sanktuloj, kiuj sekvas ne-homecajn disciplinojn kaj provas abnegacii sin al ekstremo.

Taoismo agnoskas, ke homoj havas egoismajn emojn, kaj ne rigardas tiun naturan fenomenon kiel malvirtecon. Ĝi ankaŭ rimarkas, ke homoj nature havas altruismajn emojn, kaj ke oni ne devas artefarite krei ilin per minacoj aŭ promesoj.

Kiu povus nei, ke la plibonigo de nia mondo bezonas individuajn socianojn, kiuj estas decaj kaj honestaj, kiuj komercas sen trompo, kiuj restas fidelaj geedzoj, kiuj ĝentile pritraktas konatulojn kaj nekonatulojn, kiuj laboras diligente en siaj profesioj, kaj kiuj pensas pozitivajn kaj edifajn pensojn? Kaj kiu ne konas multajn tiajn homojn?

Iuj religioj provis altigi humilecon al preskaŭ suprema virto, por batali kontraŭ homa egoismo. Sed la rezulto estas evidente, ke virtulo hezitas diri, ke li estas morale bona, kio estas alia formo de hipokriteco. Sed fakte multaj homoj, eble eĉ la plimulto, estas esence bonaj, malgraŭ la koruptaj konvencioj de la homa socio. Vidante aferojn per naturaj okuloj, ni devas agnoski, ke ni estas bonaj, kaj ne konfuzi tion kun aroganteco.

Boneco ne estas perfekteco, kompreneble, kaj ni devus plibonigi nin. Tion ni povas fari per sincero, klara pensado kaj meditado. Sed la plibonigo devus esti natura florado de nia esenca boneco, ne kompeligita mem-turmento. Al natura homo, esti bone estas plezuro.

Tamen taoismo avertas absolute kontraŭ iu ajn fanatikismo. Neniam estas tiom da danĝero al nia esenca boneco kiel en emoci-plenaj situacioj aŭ movadoj, kiuj havas bazojn en religia, nacieca aŭ rasisma entuziasmo. Eĉ taoismo mem suferis pasintec de tiaj entuziasmoj, kaj devis lerni ion de la sperto. Kaj la tuta mondo vidis la komunisman fenomenon, kiu komenciĝas en granda idealisma entuziasmo, sed estas mortanta kiel inkubsonĝo.

Kompreneble revolucioj foje estas necesaj kontraŭ netolereblaj reĝimoj kaj sociaj sistemoj. Kiu vera taoisto povus ne sopiri por renverso de la reĝimo, kiu kaptis modernan Ĉinujon en 1949, kiu gvidas ĝin kontraŭ la preceptoj de sia propra taoista heredaĵo, kaj fifaris la Masakron de T'ien-an Men?

Sed samtempe, ni devas memori, ke la unuaj rezultoj de la Franca, Rusa kaj ja Ĉina revolucioj ne estis tre kontentigaj. La Hinda revolucio kontraŭ Britujo estis pli bona precize pro la neperfortemaj metodoj, kiuj plejparte estis uzataj. Sed eĉ tie la divido de Hindujo kaj Pakistano estis mult-mortiginta kaj tragedia rezulto.

La homa progreso estas rezulto de racio, laboro, prudento kaj deco. Mildeco kaj persisto estas la necesaj. La malrapida disvolviĝo de scienco, konstitucia regado, la egaleco de la seksoj kaj universala edukado estas la plej bonaj ekzemploj.

Egale, la Taoismo avertas kontraŭ entrudiĝo en la aferoj de aliuloj, kaj tio ja estas alia interpreto de « *wu-wei* ». La deziro superregi aliulojn estas aparte kontraŭ-taoisma.

La etika programo de Taoismo estas modera. Inter esence bonaj homoj, estas plej ofte iom da vero kaj pravo ĉe ĉiu flanko de preskaŭ iu ajn disputo. Kaj ĉiam estas tento troigi kaj troemfazi unu flankon kontraŭ la alia.

Ekzemple, estas nuntempe mediistoj, kiuj deziras savi la medion per la radikala malpliigo de la viv-nivelo de la disvolviĝantaj landoj. Iuj aliuloj, kontraŭe, deziras foruzi la naturajn rimedojn de la tero sen iu ajn serioza pensado pri la longa periodo, por garanti la nunan ekonomian prosperon de la socio, kio ŝajnas pli urĝa. Ambaŭ eraras pro ekstremismo kaj unuflankeco, sed ambaŭ havas ankaŭ laŭdindajn celojn.

Taoismo konsilas, ke ni agnosku kaj la pravecon kaj la erarecon de ambaŭ flankoj. Tia modereco ne estas ekscitanta. Tamen ĝi estas agnosko de la tuta vero, ne de nur parta vero. Kaj la rezultoj do ne povas ne esti pli kontentigaj. La trankvila meza vojo estas la vera vojo de Taoismo. Ĝi sintezas kaj harmonigas kontraŭojn.

Sed finfine la taoisto « tenas la Vojon de antikveco »; lia komprenemo kaj toleremo mem estas moderaj kaj havas naturan limon. La taoisto estas homo de principo, kaj tion li ne kompromitos. Kiam la vero indikas unu solvon, li akceptos ĝin, eĉ se malŝatata de iuj kaj eĉ se ĝi sekvigas penon por li.

Konsidero de la taoisma etiko ne estus tuta sen konsidero de la problemo de vegetarismo. Tradicie oni ofte povus facile distingi inter taoisma kaj budhisma templo pro la ekzisto de viando en la manĝoj kaj ofertoj de la

antaŭa kaj la manko de viando en la dua. Sed multaj taoistoj ĉiam estis vegetaranoj, aparte en la pli moderna Norda Skolo, kaj la populara moderna sekto I-kuan Tao estas entuziasme vegetara. Pro la ĉiama sento en la vera taoisma pensado, ke ĉiuj vivaĵoj, ĉu homoj, bestoj, spiritoj aŭ eĉ demonoj, estas pli samaj ol malsamaj, oni povas diri, ke la vegetarismo de taoismo estas pli profunde kaj esence taoisma ol la viandmanĝado.

## TAOISMO KAJ SCIENCO

Ĉiam en la Ĉina historio estis Taoismo, kiu kuraĝigis kaj inspiris sciencon. Konfuceistoj plejparte interesiĝis pri libroj kaj budhistoj pri libroj kaj meditado. Sed taoismo havas ĉiam intereson pri la vivantaj faktoj, ritmoj kaj principoj de naturo. Taoismo influis Ĉinan medicinon kaj ĥemion, kaj la esploradon pri homa longviveco, krome de la praktikaj militaj artoj (*kung-fu* aŭ, pli bone, *wu-shu*).

Bedaŭrinde, Ĉina scienco tro dependis de la doktrino de la kvin elementoj (akvo, tero, metalo, fajro, ligno), kio ja sufiĉis por filozofiaj kaj religiaj celoj, sed en scienco montris sin ne utila por faciligi novan malkovradon.

Tio ne signifas, ke la pseŭdosciencoj kaj artoj, kiuj dependas de la konceptoj de la kvin elementoj kaj de viva energio (*ch'i*) estas tute senvaloraj. Ofte la konkreta esplorado kaj sperto estas validaj bazoj, kaj la rezultoj meritas la plej seriozan atenton de la moderna scienco.

Sed ne necesas al modernaj taoistoj insisti, ke ekzistas alternativa scienco, kiu estas pli natura aŭ profunda ol la konvencia norma scienco de la moderna mondo. La moderna scienco, kiu naskiĝis plejparte en la okcidento nun estas la elstara modelo de la taoisma intereso pri la naturo kaj la malkovrado de ties regulaĵoj kaj sekretoj.

La taoisma vidpunkto de la 21-a jarcento devas esti universala kaj rekoni veron ie ajn ĝi ekzistas. La monda kunlaborado dum jarcentoj pri la observado kaj esplorado de naturo estas esence taoisma, kaj ne estu la celo de Taoismo konkurenci kun ĝi, sed prefere kunlabori kaj subteni ĝin per sia naturisma kaj humanisma mond-koncepto.

## SEKSISMO KAJ TAOISMO

Taoismo estas la nura el la precipaj mondaj religioj en kiu la ina principo estas tiom forta. Taoismo konceptas pri la Tao kiel io ina, kaj tipe inaj virtoj estas ĉiam laŭdataj pli ol tipe viraj.

Kompreneble oni komprenas, ke en la fina analizo la absoluta Tao ne havas sekson, sed la *figuro* de la Tao estas konsekvence ina, same kiel en kristanismo, ekzemple, teologoj scias, ke Dio estas senseksa, sed konceptas pri *Li* vire. Li estas nia Patro, sed la Tao estas la Patrino, la Eterna Ino.

Kompreneble ekzistas ankaŭ en taoismo la koncepto de la *Yang* kaj la *Yin*, kiuj kune kompletigas unu la alian kaj konsistigas la *T'ai-chi* aŭ Granda Fino. Foje oni diras, ke la *Yang* kaj *Yin* estas vira kaj ina principoj, kvankam tio estas nur parta interpreto.

Esence, do, taoismo kredas je la egaleco de viroj kaj virinoj, kaj eĉ foje favoras la inan. Estas eble signifoplene, ke la taoismo tre serioze pritraktis la interagadon de viroj kaj virinoj en la seksa sfero de la vivo, kaj disvolvis teknikojn, por plibonigi la provizon de la viva energio (*ch'i*) per seksaj rilatoj, kaj samtempe plibonigi la plezuron kaj malplimultigi la probablecon de ekcesa koncipado.

Kvankam ankaŭ en la tantroj de la hinduismo kaj budhismo oni trovas ion similan, la naturisma kaj mense sana pritraktado de tiaj aferoj kaj teknikoj en taoismo estas plejparte unika. Certe en la plej granda nombro de tradiciaj religiaj moralaj sistemoj la batalo kontraŭ homa sekseco ofte ŝajnas esti la plej grava elemento, kaj tiu ĉi emfazo malpliigas la atenton kaj energion por la pritraktado de aliaj pli realaj moralaj malbonaĵoj.

Tamen taoismo preferas, ke ni ĝuu nian homan seksecon nature kaj sen artefarita honto, kaj ĝi preferas helpi nin fari tion pli ĝoje kaj sekure. Tio nepre ne signifas, ke taoismo deziras troigi la rolon de sekso en la homa vivo, aŭ ke ĝi ne respektas la geedzigan ligilon, aŭ ke ĝi malkondamnas kruelecon, ekspluaton aŭ kontraŭnaturecon pri sekso.

Sed fine, taoismo kuraĝigas seksan agadon, kaj ne simple toleras ĝin, kaj eĉ malpli emas konsideri ĝin kiel malhelpon al la spirita vivo. Ĉu povas esti tuta hazardo, ke ankaŭ estas

taoismo, kiu unike inter la mondaj religioj emfazas *humoron*?

## KIO ESTAS RACIA TAOISMO?

Taoismo, kiel ni rimarkis pli frue, ne estas simpla movado aŭ fenomeno. Iu taoisto diras, ke drinkado estas nepre netolerebla konduto kaj alia ke nenio en la mondo estas pli taoisma ol la ebria stato. Unu taoisto diras, ke ni povas kaj devas plilongigi niajn vivojn kaj eĉ senmortuligi nin, dum alia saĝulo diras, ke ni fakte ne scias, ĉu vivo aŭ morto estas preferinda, kaj ke longeco de vivo estas tute rilata afero.

Kie estas la « vera taoismo »? Efektive ni devas elekti, ĉar taoismo ne estas simpla konsekvenca doktrino, kaj neniam estis. Sed kiel elekti? Kiel personoj vivantaj ĉe la fino de la 20-a jarcento, ni ne povas elekti sen konsidero de la mond-koncepto de scienco kaj de nia interkultura sperto en la monda historio, kiu estas la heredaĵo de ĉiu.

Tio estas diri: ni devas elekti laŭ racio. Racio ne estas la malamiko de la intuiciaj kaj mistikismaj valoroj de taoismo. Intuicioj, kiuj ne korespondas al faktoj estas senvaloraj, kaj la mistika sperto de unueco kun la Unu ne per si mem solvas la detalajn problemojn de la bona homa vivo.

Se ni do elektas laŭ racio, ni simple elektas laŭ principoj de konsekvenco kaj sincero. Sed kion ni elektu por esti « racia taoismo »? Evidente ni elektos taoismon, kiu sekvos jenajn principojn:

1. La suprema realeco estas la TAO, io kio estas tute natura, sed kio samtempe estas fina kaj absoluta Realeco, kiu ne bezonas ion ekster si, por ekspliki sian ekziston aŭ naturon.
2. Tiu ĉi TAO estas ne-persona, sed estas kontaktebla en kaj per Naturo kaj en kaj per niaj homaj personecoj, kiuj estas partoj de Naturo. La plej profunda kaj tuta kontakto estas rekta kompreno de unueco kun la TAO.
3. Homoj estas fundamente bonaj, kaj kiam la socia medio ne tordas nin per postuloj, ke ni amu aŭ malamu kontraŭ niaj naturoj, ni nature povas esti nature moralaj estaĵoj.
4. Distingoj pri etno, raso, sekso, nacieco, ago, personeco ktp. ekzistas kaj riĉigas nian mondon, sed la fundamenta unueco de nia

## TAOISMO KAJ LA NAIVA OKULO

Taoismo estas filozofio kaj religio de naiveco. Nu, naiveco estas kutime konsiderata kiel ĉarma sed ne utila kaj eĉ foje danĝera homa kvalito. Ĝi ja estas ĉarma kaj danĝera, sed ĝi estas ankaŭ nepre utila—almenaŭ se ĝi estas taoisma naiveco.

La infano, la enamiĝinto, kaj li, kiu elvenas de malsanulejo post longa malsano en la lumon de printempa tago—ili ofte perceptas la mondon tute alie de la ordinara homo en ordinaraĵ cirkonstancoj. Al la unu la mondo estas plena da beleco, mirindeco kaj espero, al la alia la mondo estas io timinda al la prudentulo, limoplena kaj senesperiga pli ofte ol ne.

Kiu pravas? Laŭ la faktoj de la homa ekzisto ni ne devas malkonsenti. Sed pli profunde ol objektivaj faktoj kuŝas la homa sinteno. Al iu la ekzisto estas rava kvankam ĝi enhavas iom da doloro, al alia homo ĝi estas esence enuiga kaj plena da ĉagrenoj, eĉ se foje oni povas forgesi ilin provizore.

La faktoj estas samaj, sed la interpretoj de la homa menso estas malsamaj. Kiu sinteno do estas prava? La ordinara realisto, kiu supozas sin prudenta, fakte atingas malpli da feliĉo ol la taoisma saĝulo/malsaĝulo. Ĉu ne ia prudento, kiu kondukas al malfeliĉo havas mankon?

La taoisma naivulo per la naiva okulo vidas la ĉielon kaj trovas en ĝia blueco mirindecon, kiu meritas longan kontemplaton; li rimarkos ke iuj kunlaboraj agadoj kun membroj de la alia sekso estas tre agrablaj, kaj ĝuos ilin sen supozo ke tio estas speciala morala problemo; li vidos la ĝojan en la vizaĝo de bezonulo kiam li ricevas donacon, kaj donos al li ĝoje ĉar ĝi estas tiom agrabla; li gratos jukon kun plezuro, kaj ne malbenos la moskitojn; li laboros kun pli da konsidero de la valoron li kreas ol la monon li gajnas; kaj la leĝojn, ordonojn kaj regulojn ĉirkaŭe li sekvos se ŝajnas esti bona kialo, sed neniam supozas, ke iu rajtas limigilian naturan liberecon. Kaj foje li grimpos arbon, kantos sole aŭ staros sur la kapo tute pro la ĝojo, kaj eĉ sen neceso drinki kiel antaŭkondiĉo!

En taoismo oni provas malkovri esencan originan bonon, ne krei artefaritan bonon, kie nenio ekzistis antaŭe. Estas esence al la tipa taoisma sinteno, ke ni bazu ĉion sur ĝojo, ne sur kulpkonscio. Natura libereco kun ne-agresemo kontraŭ aliuloj estas preskaŭ unika morala bazo inter la tradiciaj religiaj kaj filozofiaj sistemoj de la mondo, sed eble tiu, kiu estas la plej verŝajna kaj alloga en la 21-a jarcento.

homeco kaj natureco devus nature unuigi nin pli ol niaj malsamecoj dividas nin.

5. La identeco de ĉiu persono kaj ĉiu etno en la mondo estas respektindaj kiel manifestaĵoj de la TAO mem. Ĉiuj formoj de ordonemismo, kiuj ne respektas individuecon kaj homan liberecon estas profunde kontraŭ-taoismaj.

6. Agreŝemo kaj nenecesa enrudigo en la vivojn de aliuloj estas la plej seriozaj pekoj de taoismo; kontraŭe, mildeco, helpemo kaj modereco estas la plej gravaj sociaj virtoj.

7. Sincero estas la plej grava persona virto, ĉar sen sincero eĉ la plej bona logiko estos uzata por pruvi ne la veron, sed la preferon. Respektinde la fakton, ke ni ĉiu havas parton de la vero laŭ la limoj de nia individua sperto, pensado kaj kapablo, ni povas per sincero harmonigi niajn partojn de la vero kaj ĉiu komprenos pli multe.

8. La bestoj similas al homoj, kaj ni al ili. Komprenante tion, havante konsciajn moralajn naturojn, kaj ne bezonante la karnon de sentantaj bestoj por nia nutrado, ni plej bone ne manĝos viandon forprenitan de la korpoj de niaj animalaj gefratoj. Kaj eĉ arbojn kaj herbojn ni preferinde ne detruu sen bona kaŭzo.

9. Ni devas respekti niajn denaskajn bezonojn por memkonservado kaj seksa esprimo, kaj labori por helpi ĉiujn vivi longe, sekure kaj sane, kaj ĝui amor-vivon sen nenecesa malhelpo. Samtempe ni fidus je la ekzisto de denaskaj altruismaj kaj sociaj impulsoj, kiuj malhelpos memkonservadon pere de maljusteco al aliuloj kaj amoro sen korinklino.

10. Kvankam taoismo devas esti tolerema kaj ne-entrudema, ĝi samtempe havas siajn propran principojn, kaj neniam konsentos perdi ilin aŭ ĉesi pri atestado al ili; aparte, ĝi neniam povas aprobi la nenecesan subpremon de la individuo nur por konservi la kutimojn de la grupo, nek la kaŝadon de vero.

Kompreneble, la taoismo ne nur ekzistas kiel doktrinaro. Ankaŭ la praktikado de meditado kaj la taoismaj artoj estas gravega, kaj taoismo havas sian propran stilon, kiu allogos iujn, ĉar ĝi taŭgas por ties spirita vivo.

Ni trovas en Esperanto tre taoisman ilon por la paca komunikado inter ĉiuspecaj homoj, kiu samtempe ebligas unuecon kaj la konservadon de la unikaj naturoj de etnaj lingvaj kulturoj.

TIAL, ĉu ne valorus, se ekzistus UNIVERSALA TAOISMA STUD-LIGO en Esperantujo? Tia organizaĵo povus:

1. provizi forumon por la interŝanĝo de informoj kaj spertoj pri taoismo kaj ties artoj kaj kulturaj manifestaĵoj;

2. antaŭenigi taoismajn valorojn en Esperantujo kaj la mondo;

3. informi kaj eduki pri la naturo kaj valoro de taoismo;

4. provizi ilon por kunlaborado de personoj kies spiritaj sentoj estas precipaj taoismaj egalnivale kun aliaj religiaj grupoj kun similaj celoj, ekz-e bahaanoj, oomotanoj, budhanoj;

5. kuraĝigi seriozan sciencan esploradon pri la vereco, valoro kaj efiko de taoismaj sciencoj, teknikoj, kaj praktikaj artoj (sen antaŭjuĝo, ke ili ĉiam ja estos konstatitaj veraj, valoraj aŭ efikaj); kaj

6. interkonatigi personojn kun taoismaj spiritaj, filozofiaj aŭ estetikaj sentoj, kun la celo de amikeco kaj ĝenerala kunlaborado inter similtensuloj.

SE tiu ci propono interesas vin, bonvolu kontakti la verkinton de tiu ĉi propono ĉe la sekva adreso:

Bradio V. Moro III  
ul. Pionierów 6 A 9  
PL-47-220 Kędzierzyn-Koźle  
Pollando



# Tekstoj de la Tao Te Ching (la klasiko pri la Vojo kaj Virto) de Lao-Tzu

## LA TAO

La Vojo estas malplena,  
sed uzu ĝin kaj ĝia utilo estas  
neelĉerpebla.

Nesondeble!  
Kiel la Praulo de la Dek Mil  
Aĵoj.  
Malakra ties klingo,  
Malnodigitaj ties implikaĵoj,  
Harmonia ties brilo,  
Subigita ties tumulto.  
Profunde Ĝi ŝajnas ekzisti.  
Mi ne scias estas kies filo,  
Imago de tio antaŭ la Dio.  
(TTC, IV)

Tio, kion oni rigardas kaj ne  
vidas, nomiĝas la Nevidebla;  
Tio, kion oni aŭskultas kaj ne  
aŭdas, nomiĝas la Neaŭdebla;  
Tio, kion oni tenas sed ne  
kaptas, nomiĝas la  
Nepalpebla.  
Ĉi tri ĉiuj evitas nian  
esploradon,  
Tial ili unuiĝas en unu.

∞  
Ĝi nomiĝas la Formo de la  
Senforma,  
La Imago de Nenio.  
(TTC, XIV)

Antaŭ la ekzisto de la Ĉielo kaj la  
Tero ekzistis la nebula.  
Silente! Izolite!  
Starante sole kaj ne ŝanĝigante,  
Daŭre movante kaj ne ĉesante,  
Eble esti la Patrino de Ĉio sub la  
Ĉielo.  
Mi ne konas ĝian nomon,  
Sed titolas ĝin la Vojo.  
(TTC, XXV)

La Granda Vojo inundas dekstre  
kaj maldekstre.  
La Dek Mil Aĵoj havas la vivon de  
Ĝi kaj naskiĝas,  
kaj Ĝi neniam rifuzas al ili.  
Kiam Ĝi finas la laboron,  
Ĝi ne posedas.  
Ĝi vestigas kaj nutras la Dek Mil  
Aĵojn kaj ne fariĝas ties mastro.  
(TTC, XXXIV)

## VIRTO

La Vojo naskas,  
La Virto Paŝtas,  
La materio formigas,  
La ĉirkaŭstancoj kompletigas.  
Tial, inter la Dek Mil Aĵoj  
ne estas iu, kiu ne respektas la  
Vojon  
kaj valoras la Virton,  
sen ordono sed ĉiam spontane.  
Tial la Vojo naskas,  
La Virto paŝtas, kreskigas, edukas,  
donas havenon...,  
Nutras kaj ŝirmas.  
Ĝi naskas kaj ne posedas,  
Agas (helpante) sed ne proprigas  
al si,  
Kreskigas sed ne mortigas.  
Tio ĉi estas la Mistera Virto.  
(TTC, LI)

## NE-AGADO

La Vojo ĉiam faras nenion,  
Kaj nenio estas ne-farita.  
(TTC, XXXVII)

Tial la saĝulo diras:  
Mi faras nenion, kaj la popolo  
mem pliboniĝas;  
Mi amas kvieton, kaj la popolo  
mem justigas;  
Mi havas neniujn aferojn, kaj la  
popolo mem prosperas;  
Mi havas neniujn dezirojn, kaj la  
popolo mem honestiĝas.  
(TTC, LVII)

Mi havas tri  
trezorojn:  
Gardu kaj  
konservu ilin:  
La unua estas  
Amo,  
La dua estas  
Modereco,  
La tria estas  
Senambicieco.  
Per amo oni povas  
esti kuraĝa,  
Per modereco oni  
povas abundi,  
Per senambicieco  
oni povas (nature)  
kreskigi sian  
kapablon.  
...  
La amo estas  
venka en batalo,  
kaj firma en  
defendado.  
La Ĉielo donas la  
amon al tiuj, kiujn  
Ĝi volas savi.  
(TTC, LXVII)



Okaze de la 400-jariĝo de lia morto :

ĉu budhisteca estis Montaigne ,

la franca filozofa kaj patro de la ĝenro eseoj

*Kvankam Michel de Montaigne [Mikaelo de Montenj, mortonta la 13-an de septembro 1592] mem skribis : "Mi volonte revenos de la alia mondo por malkonfirmi tiun kiu formus min alia ol mi estis, eĉ por honorigi min", mi ne rezistas la tenton mencii proponon de studotemo kiu povus aperigi unu plian - neatenditan - faceton de tiu eksterordinara personeco, ĉiukaze jam "disŝirita en mil kontraŭajn vizaĝojn" (kion almenaŭ li sukcesis evitigi al sia fama amiko Etienne de La Boétie).*

*Mi do ne provos priskribi Montaigne, nek kiel humaniston, nek kiel epikuristan verkiston, aŭ stoikiston, aŭ radikalan skeptikiston, aŭ aŭdaculon, aŭ prudentan konservativulon, aŭ kontraŭ-reformacian katolikon (Philippe Solers), ktp.*

*Mi decidiĝis nur traduki jenan pensigan eron el artikolo de Roger-Pol DROIT titolita "La kuraĝo nescii" :*

#### Proksimeco de la budhistoj

Tiu "penso kies radikalan intencon la okcidenta filozofio miskonis", skribas Claude Lévi-Strauss, "estintus pli bone komprenata de la Ekstrema-Oriento" (\*"Histoire de lynx", Paris: Plon, 1991, p.286). Efektive, inter Montaigne kaj la budhistoj, sen ia ajn influo, pli ol unu respondeco estas trovebla.

Oni povas studi, ekzemple, iliajn paralelajn asertojn pri :

- la regado de la ŝajno,
- la rifuzo pri metafiziko,
- la kunekzistado de nescio kaj sereneco,
- la nekaptebleco de la aĵoj,
- la statuso de la besta vivo,

- la kompato kontraŭ sufero - tute alia ol kristana karitato kaj ties loto de ofera amo.

Pli ol al la grekaj skeptikaj, eble al la budhanaj logikistoj de la "meza vojo" Montaigne povus esti komparata, speciale kiam li asertas : "La plejparto el la okazoj de la konfuzoj en la mondo estas gramatik[deven]aj". (\* La aŭtoro de la artikolo aludas ĉi tie la filozofon Nagarĝuna).

Ĉefe ĉirkaŭ la temoj de la nekonsstanteco, de la transireco, de la nekontinueco, la afinecoj estas la plej fortaj.

Kiam Montaigne skribas, ĉe la fino de la Apologio de Rajmondo Sebond : "Estas neniu konstanta ekzistado, nek de nia esto nek de tiu de la objektoj", la frazo povus esti prenita por la resumo de granda nombro de budhanaj analizoj.

Tiu proksimeco inter Montaigne kaj la budhistoj memkompreneble tute ne estas simileco. La paralelo meritas detalan esploron kiu, laŭ nia scio, mankas.



# Mia ĝojo, ke realigis la idealo de mia juneco

Mi nomiĝas DEGUCHI Kyotaro, kaj mi apartenas al "Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto" en Japanio.

Antaŭ ĉio, mi permesas al mi esprimi miajn dankojn al ĉiuj koncernaj personoj de IRKE kaj ASISTI pro ilia daŭra penado. Kaj due, mi esprimas mian profundan dankon pro tio ke hodiaŭ [28-an julio 1992], en la kunsido de IRKE, mi povas fari raporton pri paŝoj de mia ĝisnuna modesta vivo.

Nu, la ĉi-kunsida temo estas "Rilato inter idealismo kaj realismo". Mi estas tre malforta je malfacila prikonsiderado aŭ disvolvado de teorio. Tial, mi volas rakonti al vi iom pri la irado de realiĝo de aferoj pri kiuj mi revis en la tagoj de mia junaĝo kaj kiuj ŝajnis, por tiel diri, kaj idealo kaj fantazio.

Tio estis ebla danke al bonŝanco kaj al tio ke mi estis favorata de bonaj instruistoj kaj antaŭuloj, kaj plue al granda helpado al mi fare de multaj homoj. Kompreneble, nenio estas eĉ pensebla sen tiuj elementoj ; tamen, oni ankaŭ ne povas ignori, aliflanke, mian propran inklinon al revemo, kaj la ardan deziron ĝin efektiviĝi.

Proverbo diras : "Kie estas volo, tie estas vojo". Kio donis al mi tiun volon, revon kaj idealon, tio estis ja Esperanto. Al mi en la koron venis revo, motivita de Esperanto, kaj sekvis ĝia mirinda irado kaj disvolviĝo ĝis la hodiaŭa tago.



Ne temas pri historio de sukceso ; nek pri propagando je mia propra personeco. Mi estus feliĉa se vi bonvolus akcepti jenon kiel unu ekzemplon de la grandeco de la influorto kiun en si mem Esperanto havas.

Nu, Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, al kiu mi alpartenas, renkontos en la venonta jaro sian sepdek-jaran jubileon, kaj ĝia patrino, kiu estas organizaĵo de spiritala movado nomata Oomoto, festas en tiu ĉi jaro la centjaran jubileon de sia fondiĝo.

En tiuj ĉi unu-du jaroj oni celebras ceremoniojn - festajn eventojn memore al la centjara jubileo - kaj kadre de la tuta aranĝo ni kovas planon havi en aŭgusto de la venonta jaro memoreventon por la sepdek-jara jubileo de EPA. Kaj ni preparas nin fari inviton al tio de reprezentantaj esperantistoj de pluraj landoj, ekzemple s-ro prezidanto de UEA kaj d-ro ZALESKI-ZAMENHOF.

## Naskiĝo dum persekuto de Oomoto

Nu, mia avo Onisaburo DEGUCHI kun simpatio aprobis la homaranismon de d-ro ZAMENHOF kaj la Esperanto-movadon, enkondukis Esperanton al Oomoto en 1923, fervore kaj serioze aktiviĝis en la disvastigo de Esperanto kaj Esperantismo.

Ankaŭ mia patro Hidemaru DEGUCHI arde flamiĝis je Esperanto de tiu tempo, kaj restis fidela al ĝi rekomendante Esperanton al multaj homoj.

Kvankam en tia medio mi kreskis, tamen ne estis, ke mi havis intereson pri Esperanto de mia infaneco.

En la jaro 1936, kiam mi naskiĝis, Oomoto estis jam komplete pereigita, t.e. organize kaj movade kaj funkcie kaj ĉiaforme, per la persekuto kontraŭ religio kaj ideologio fare de la potenco de la japana ŝtato. Kaj la ĉefsidejoj de Oomoto kaj sidejoj de diversaj filioj estis detruitaj.

En la du centroj kun la ĉefsidejoj de Oomoto, nome en la urboj Ajabe kaj Kameoka, ĉiutage eksplodis dinamito, tradetruanta ĉiujn konstruaĵojn ; kaj miaj geavoj, gepatroj kaj aliaj familiaj estis, kune kun 3.000 gvidantaj adeptoj el la kredantoj, enĵetitaj en policejon aŭ malliberejon (por akuzitoj) dum longa tempo.

Tiu ĉi okazintaĵo tiel nomata "Oomoto-afero la dua" ekestis la 8-an de decembro 1935 kaj, precize 10 jarojn poste, estis solvita la 8-an de decembro 1945 ; do mi mem naskiĝis en la mondon ĝuste en la mezo de tempo de mallumo, persekutata (...).

Kaj samtempe Japanio estis en periodo de plenflora militismo. Popolanoj estis arestitaj kaj punitaj fare de polico aŭ armeo, kaj ankaŭ de ŝtatanstanco, sole pro tio ke ili havis ideon pacifisman aŭ kontraumilitan.

En tia senco tiam estis la periodo de mallumo kaj teruro, por popolanoj ĝenerale kaj ankaŭ, kompreneble, por esperantistoj.

Nu, finiĝis la dua mondmilito. En tiu ĉi jaro, 1945, reviviĝis la Esperanto-movado en Japanio, kaj reviviĝis ankaŭ Oomoto. Tiam mi apartenis al la tria klaso de elementa lernejo kaj estis 9-jara.

Poste (...) okazis Olimpiko unuafoje en Japanio, en 1964. En la sekvanta jaro, 1965, estis organizita la 50-a Universala Kongreso de Esperanto, por la unua fojo en Japanio.

Kvin jarojn antaŭ la UK en Japanio, nome en 1960, kiam mi estis 24-jara, mi fariĝis esperantisto, pro tio ke amikoj tion rekomendis al mi, kaj ankaŭ ĉar min tuŝis la traktaĵo de mia patro nomata "Neceso de Esperanto-lernado".

Por diri la veron, de mia studenteco mi estis granda malŝatanto de lingvo-lernado, kaj en la atesto pri la lingva-lernado mi havis ĉiam la plej malaltan noton en la tuta klasĉambro. Kaj tial, ankaŭ ĉe Esperanto, mi estis ja fervora en ties propagando, tamen en la ĉefa afero, la lingva lernado, mi ne progresis.

Pro tio, ankoraŭ nun mi restas ĉe tia nivelo, ke mi apenaŭ elturniĝas en la ĉiutaga konversacio. Do en tiaj cirkonstancoj oni povus diri ke mi estas esperantisto, tamen nur malnova komencanto, aŭ eventuale : eterna komencanto.

#### La celo de KOLUMBO : "Zipango"

Mi estas certa ke vi ĉiuj jam scias ke antaŭ 500 jaroj, laŭ epizodo el la historio, Kristoforo Kolumbo ekŝipis cele al Zipango, la lando de oro ; ke tamen la loko kiun li hazarde atingis estis la amerika kontinento, anstataŭ Japanio, lia celo. (...) Ĉiukaze, kiel japano mi ricevis iom da sento profunde en la brusto ĉe tiu punkto, ke Japanio donis ian motivon en tiu ĉi historio.

#### Revon kaj idealon per rondvojaĝo en Esperantujo

Mankas al mi lingva kapablo, kaj mi multe hontas pro tio, sed bonŝance, dank'al Esperanto kaj esti mata sinjoro UMEDA Yosimi, mi tamen povis en la tria jaro de mia esperantistiĝo, en 1963, fari vojaĝon ĉirkaŭ la mondo. Tio estis mia unua rondvojaĝo en Esperantujo.

(...) Da disponebla fremda valuto estis malsufiĉe, kaj mi apenaŭ rajtis kunporti nur 300 dolarojn por la granda vojaĝo dum 110 tagoj tra 53 urboj en 14 landoj de Eŭropo kaj Usono. (...) Tio estis fenomenaj okazintaĵo por mi, 27-jara.

Dum tiu ĉi rondvojaĝo en Esperantujo al mi en la koro ekfontis granda revo. Tio estis verki kaj eldoni libron post la reveno hejmen en Japanio, kaj

iam aranĝi eksterlande ekspozicion de artaĵoj de mia avo ; kaj plue, prezenti al alilandaj publikoj la japanan tradician kulturon, organizi kaj delegi tiucele karavanon aŭ ion similan.

En tiu tempo la japana registaro strikte limigis eblecojn vojaĝi eksterlanden. Krome mi estis juna kaj havis apenaŭ forton ion fari. Tial la socio senkompate forridis tian revon, dirante ke temas nur pri simpla idealo.

#### La idealo iĝis realo

Post la reveno hejmen mi trafis malfacilaĵojn sur la diversaj kampoj de la vivovojo, nome de socio, hejmo, ĉiutaga vivo, ekonomio ktp., kaj tute ne eblis al mi okupiĝi rekte laŭ la linio de la revo kaj idealo, inspirintaj min dum la vojaĝo. Mi tamen neniam povis forgesi ĉion ĉi.

Kaj vere dankinde, kaj efektive bonŝance, en la daŭro de 30 jaroj de tiam ĝis hodiaŭ, tiuj idealoj ne restis simple nur idealoj, sed ja realiĝis unu post alia, kvankam nun mi preterlasas detalojn prezentante al vi ilian procezon.

- La ideo verki kaj eldoni libron efektiviĝis per la eldoniĝo de la vojaĝpriskribo sub la titolo "Rondvojaĝo en Esperantujo" kaj de la biografio de mia avo : "Giganto: Deguchi Onisaburo".

- La artekspozicio de verkoj de mia avo fruktiĝis kiel la artekspozicio kiu, komencante ĉe la Muzeo Cernuschi en Parizo kaj la muzeo Victoria & Albert en Londono, migris tra 13 urboj en 6 landoj de Eŭropo kaj Norda-Ameriko dum 3 jaroj kaj 3 monatoj.

- La revo prezenti al eksterlandaj publikoj japanajn tradiciajn artojn, havis frukton kaj en Eŭropo, kaj en norda kaj suda Ameriko, kaj en partoj de Azio. Tiu ĉi projekto ankoraŭ nun daŭras kiel interkomunikiĝo de reciproka kulturo kaj amikeco.

Kaj cetere, kiel konstanta evento, estas fondita la Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj. Ĉiujare ĝi organizas someran kulturseminarion en Kameoka kaj Ajabe.

Kvankam skale malgranda, tiu ĉi projekto kaj evento iel stabiliĝis, kaj ni alremis ĝis tiu ĉi jaro kiam ni salutas ĝin por la 16-a fojo. Nun ni havas 324 kursfinintojn en 24 landoj de la mondo (ĝis la seminario de 1991).

Ankaŭ somera kulturseminario por nur esperantistaj partoprenantoj okazis dufoje, kaj ni deziras aranĝi tion ankaŭ estonte. Kaj ni vere ĝojas kaj dankas la fakton, ke tiel ni povas eĉ iomete stimuli nin en la akcelado de interŝanĝo, bondezirado kaj amikeco inter la popoloj, kvankam temas nur pri tre modesta entreprenado.

## Unu Spirito, mondo, lingvo, civilizo, tero

Kiel mi hodiaŭ havas la plezuron raporti al vi, danke al Esperanto kaj danke al multaj, realiĝis la idealo kiun mi ekhavis antaŭ 30 jaroj ; kaj tio nun tiel kreskis ke ĝi iĝis tia tasko kiel vivlaboro por mi.

Estas okazoj kiam la idealo restas por ĉiam idealo, kaj okazoj kiam el la idealo naskiĝas realo. Kaj tiu realo naskas sekvantan idealon, kaj tiel oni antaŭeniras : jen ĝojante, jen ĉagrenite, kaj jen denove provante restariĝi.

Feliĉe al mi, en la daŭro de tiuj ĉi 30 jaroj, mi havis aferon rilate al tiuj taskoj kaj laboroj ; kaj instigite de ili mi baldaŭ komencis profunde okupiĝi pri la **interreligia movado** kunlabore kun diversaj religioj de la mondo ; kaj kiel akso rolis komuna preĝado. Kaj mi iĝis ankaŭ unu el la akcelantoj, malgraŭ mia neplena taŭgeco.

( Okazis ankaŭ ke mi nun iom partoprenas en la mondfederisma kaj mediprotektada movadoj.)

Kvankam mi estas homo malperfekta en ĉiaj punktoj, eĉ kiel esperantisto (mi restas nur eterna komencanto), tamen, malgraŭ tio, iel okazis ke mi tiel sekvas la homan vivon - ekde la tempo de mia juneco ĝis hodiaŭ kiam mi ekmaljuniĝas - sub tiaj devizoj kiel :

" Unu Dio (Spirito), unu mondo, unu lingvo,  
unu homara civilizo, unu patrino tero. "

Kun danko al Dio kaj al vi ĉiuj pro tio ke mi estis favorata de diversaj kondiĉoj, kaj dankante al Esperanto, mi forte deziras ke ankoraŭ plue en estonteco mi estu diligenta kune kun tiaj devizoj en la plenumado de mia vivlonga tasklaboro.

Mi estas preta vivi, por esp rimi min iom ŝerce, kune kun la "febros" de homaranismo kiu "infektis" min en mia juneco, kaj kune kun la "vermo" de Esperanto, kaj ankoraŭ plue daŭrigi paŝon post paŝo la kulturinterŝanĝon kaj kunlaboradon inter ĉiulandaj popoloj, celante la internacian komprenon, amikecon, harmonion kaj bonvolemon, kaj ĉiam kun Esperanto kiel akso.

Tamen, ankaŭ tiuj celoj restos simplaj idealoj se ni nur revas ilin. Ĉu la tuta afero ne estos io tia, ke ripetante provojn kun eraroj, stumblojn kaj releviĝojn, ni plenumas, eĉ po iomete, tion kaj alion ? ke nur tiel ĉio ricevas efektivan realecon ?

Estos por mi tre granda ĝojo se estos eĉ nur iomete da konformeco inter la temo ["Rilato inter idealismo kaj realismo"] de tiu ĉi fakkunsido de IRKE kaj la modesta vojo de mia vivo, kiun mi laŭpaŝis ĝis hodiaŭ, kaj kiun siatempe motivis Esperanto.

Mi estas plene danko al vi, pro via afableco min aŭskulti: bonvolu akcepti mian sinceran dankon !

Dankon por via okcitana ampoezio.

Ĉar en PIV, same kiel en multaj francaj vortaroj, ne estas rekte videbla ke temas pri plena lingvo, necesas iaj klarigoj.

Unuflanke la suda Francujo estis latinigita - kaj tion forte - jardekojn antaŭ la selta nordo. Aliflanke nur la norda duono ĝermaniĝis iom sub la Frankoj (Karolo la granda) en la 8-a jarcento, tiel disiĝante de komuna lingvo kaj kreante la pralingvon de la Parizdevena hodiaŭa franca.

Ĉirkaŭ Bòrda (Bordozo) kaj Tolosa (Tuluzo) de la 11-a ĝis la 13-a jarcento la amkantistaj trobadoroj kreis altnivelan kulturon kiu disradiis tra parto de Eŭropo. En la 13-a jarcento, post malvenko kontraŭ Francujo, la sociaj strukturoj kiuj subtenis la kulturon en la vasta Tuluza graflando ĉesis.

En 1539 la fiedikto de Villers-Cotterets igis la francan la sola oficiala lingvo en tiu multlingva lando. Same, la nur franclingvaj universitatoj celis francigi almenaŭ la intelektulojn ; kaj nigrigadkampanjo kontraŭ la "senvaloraj dialektetoj" tiagrade sukcesis, ke jam nur en 1790, 90 % el la okcitanaj parolis ilian lingvon.

Kaj en nia jarcento, subprema lernejsistemo preskaŭ tute mortigis la lingvojn de Francujo. Tion oni nur malofte vidis eĉ en Sovetio, kaj ankaŭ Anglujo lasis almenaŭ iujn paroli sian propran lingvon.

Kio eble interesos vin pli, sed pri kio mi ne estas spertulo, estas la herezia **religio de la Kataroj**.

Vidinte la diboĉan [katolikan] eklezion, vasta parto el la popolo volis pli puran religion, bazitan sur la Biblio kaj sur pura agadmaniero.

Ĉiuj fariĝis egalaj kaj devis labori. Eĉ la nobeloj fariĝis metiistoj, kaj la povuloj helpis la bezonulojn. Ili kredis je renaskiĝo kaj je la du[al]ismo, ekzemple de la bono kaj malbono (maniĥeismo).

Tion la papo kaj la franca reĝo ne plu povis toleri. Ili sendis armeon sub gvidado de Simon de Montfort kiu kruele detruis ĉion, kaj fine venkis kontraŭ Tuluzo (1209-1229).

La lastaj Kataroj supreniris al la nun fifama fortejo Montségur (laŭdire kunprenante la Sanktan Gralon), kaj tie pereis (1244). Dum unu jarcento ankoraŭ okazis jen kaj jen inkvizicio kontraŭ iu Kataro, sed la movado ĉesis (kvankam ankoraŭ hodiaŭ, pro la tiama krueleco [de la persekuto], iuj duonserioze diras sin Kataroj).

Kvankam estis Kataroj ankaŭ en aliaj regionoj, ĝis Lombardujo kaj eĉ Balkanoj, la centro estis ĉi tie en Lengadoc (Langvedoko).

Kaj kvankam temis almenaŭ unuavide pri religia afero, ĝi signifis la finon de la Tuluza graflando kiu, de Tuluzo ĝis Provença (Provenco) inkluzivis grandan parton de ekestanta politika Okcitanujo. Kaj kun tiu fino, komencis ankaŭ la supre priskribita preskaŭfino de la "sudfranca" lingvo.

Daniel Pfeiffer, Castanet (F), 12-7-1992

# El la okcitana

## L'Albre d'Amor

Sachon los fisèls amadors  
que doas manièiras son d'amor,  
l'una non ac començament  
ni jà non aurà finiment,  
aiçò es lo Sant Esperit  
que es d'amor font e rasitz,  
e se aiman d'aquel amor  
lo Paire e lo Filh entre lor,  
dont procesís d'ambdos ensems  
del Paire, e del Filh, senes temps (...)  
Donc non es creada l'amor,  
mas es ben verai creator  
de totas las causas que son  
e sus al cèl e jos al mond.

Dieu, qu'es sens tot començament  
faguèt tot çò qu'es de nient :  
de primièr creèt Natura  
regent tota creatura (...)  
Comun al las creaturas  
sentents, segon lors naturas,  
e d'òmes especialament  
e de femnas en lor jovent :  
lo (quel) desir li ven ensems  
quand senton venir lo douç temps  
de pascor, aprèp caresme  
- es l'amor de mascle amb feme.  
L'aultra amor's de son enfant,  
que totas creaturas an (...)

<Lo> ver fundament e rasitz  
de tots bens, segon Dieu ditz,  
e creire o devem sens dohtar,  
sens l<o> qual non se pòt salvar,  
a l<o> qual de còr ieu m'apròsme,  
es l'amor de Dieu e del pròsme.  
L'otra amor's de bens temporals  
que es ocasion de molts mals,  
quand es desaordenada,  
mas de bens quand es temprada (...)  
E qui Dieu per bens temporals  
ama, l'amor non es coral,  
ni veraia ni certana,  
mas es amor de putana.

Matfre Ermengaut de Besièrs  
sénher en leis e d'amor sèrv  
e non solament sèrv d'amor,  
mas de tot fidèl amador.

## ( La kvar brançoj de )

### La Arbo de Amo

Eksciu fidelaj amantoj  
ke estas du ammanieroj.  
L'unua ne havis komencon  
kaj havos neniam ja finon.  
Ĝi estas la Sankta Spirito,  
radiko kaj fonto de amo  
per kiu la Patro kaj Filo  
unu la alian amadas  
( de kiuj la Sankta Spirito  
devenas, de ambaŭ sentempe (...))  
Ne estas kreita do amo,  
sed male ĝi estas kreanto  
de ĉiuj la aĵoj estantaj  
sur la ter' aŭ en la ĉielo.

Di' estas sen ia komenco  
kaj faris ja ĉion el neni'.  
Unue li kreis Naturon  
reĝontan pri ĉiu kreito (...)  
Komuna al ĉiu kreito  
senshava, laŭ ties naturo,  
ĉefe de virino kaj viro  
dum tuta ilia juneco,  
deziro al ambaŭ samtempe  
alvenas kun sento de dolĉa  
la tempo de Pasko post Fasto.  
Ĝi estas am' de vir' kaj virin'.  
Alia am' estas al filo.  
Ĝin havas ja ĉiuj kreitoj (...)

Vera fundament' kaj radiko  
de ĉiuj ajn bonoj (laŭ kion  
Di' diris kaj devas ni kredi),  
sen kiu ne eblas saviĝi :  
mi turnas la koron al amo  
al Dio kaj la proksimulo.  
Alias la amo al aĵoj,  
per kiu okazas malbonoj  
se estas ĝi tute senorda,  
sed bonoj se oni ĝin bremsas. (...)  
Kaj amo al Dio nur cele  
al aĵoj, ne estas elkora  
nek vera nek certa nek inda  
sed amo tutsimple putina.

Matfre Ermengaut de Bezjerso,  
magistro pri leĝoj, *servanto de amo*,  
kaj ne nur de amo sed ankaŭ  
de ĉiu fidela amanto.

# Konvertiĝoj en Nord-Norvegio

Trans la polusa cirklo, je apenaŭ 250 km de la Norda Kabo, la malgranda insuleto Karlsøy (10 km<sup>2</sup>) estas aparta pro la du jenaj kialoj :

- Iĝinta preskaŭ senhoma duone de ĉi tiu jarcento pro la alsuda elmigrado, ĝin reloĝatigis ekde 1968, laŭ komunuma modelo, gejunuloj venantaj el la tuta Norvegio kaj eĉ de Svedio. (La loĝantaro, kiu konsistas preskaŭ nur el margenuloj, verŝajne nun stabiligis : ĉirkaŭ cento da homoj).

- Kaj paro de islamaj svedoj tien enkondukis islamon (sunaisman, sed kun sufiaj influoj).

MONA NORDIN, svedino jam vivinta pli ol 10 jarojn sur Karlsøy kaj (ne prozelitisma) disvastiginto de islamo sur la insuleto, afable konsentis mallonge priskribi sian spiritan itineron.

17-jara ŝi estis irinta al Maroko : ŝia unua kontakto kun islama lando. Kaj en 1969 ŝi decidis foriri al Hindio, kunportanta du librojn en sia dorsosako : la Nova Testamento kaj la Ji-king (la klasika ĉina "libro pri la fariĝado").

Ŝi petveturante atingis Kuvajtion ; sed la taksisto kiun ŝi pagis por aŭte transpasi la landlimon veturigis ŝin rekte al ...la policejo. La policistoj, tre afablaj, kondukis ŝin ĝis la haveno kaj montris al ŝi grandan pasaĝerŝipon kiu estis forironta al la Oriento post tri tagoj. Unu el ili proponis intertempe gastigi ŝin en sia familio.

Ŝi respondis ke ŝi ne volas veturi sur tia ŝipego, tro luksa por ŝi kaj ŝia monujo, sed sur multe malpli belaspekta ŝipeto kiu estis forironta nur post tri semajnoj, al Abudabi. Tiel, ŝi restis dum tri semajnoj en Kuvajtio, kaj estis ege imponita de la gastemo kaj religia fervoro de sia gastiga familio.

Same, ŝia ŝipa vojaĝo al Abudabi (antaŭdirite nur tritaga sed kiu fakte daŭris tri semajnojn !) lasis markon funde de ŝia koro : ĉiun matenon la subita tagiĝo \*, kun la maristoj kiuj rapide stariĝis en la duonombro kaj la alvoko de la muezino al la preĝo kiu poste ritmis la tutan tagon, ĉio ĉi vekis profundan spiritan senton en ŝi.

Reveninte al Stokholmo ŝi ĉeestis vesperajn kursojn pri la araba kun siria instruisto, kiu estis doktoro pri literaturo sed tamen nekapabla traduki por ŝi unu el la vortoj de la preĝalvoko. Tiu "mistero" instigis ŝin profundigi sian serĉadon kaj sian konon pri la araba lingvo, vehiklo de kulturo tiel malsama ke ĝi povis fojfoje esti netradukebla.

19-jara ŝi konatiĝis kun Stokholma "esoteristo", kiu cetere malfermis tie la unuan vendejon de biologie naturaj nutroproduktoj (daŭre funkcia-

tan) kaj ricevis esperantlingvajn revuojn de la tuta mondo. (Pro tio ŝi estis surprizita kaj interesita, post pli ol 20 jaroj, ricevi redaktoron de esperantlingva revuo pri religi-komparaj studoj ...kiu cetere estis la ununura alia pasaĝero, la antaŭan tagon, sur la pramo, krom ŝia edzo kaj ŝi : ni tiam nur interŝanĝis kelkajn vortojn kiam ŝi alparolis min afable proponante al mi gorĝan pastelon).

## Plej rekta, rapida kaj sekura vojo

Ŝi partoprenis kun li en kuracpreĝaj kunvenoj. Ŝi mem ne preĝis ĉar ŝi ne volis ĝene altrudiĝi ĉe la "Boss" ("Ĉefo") krom nur se nepre necesus. Post traspertado de pluraj spiritaj krizoj, tamen ŝi iam finfine petis Dion indiki al ŝi "la plej rekta, mallongan, rapidan kaj sekuran vojon". Tiam ŝi renkontis sian edzon, unu el la tre malmultaj islamaj svedoj, kun kiu ŝi havis ses infanojn.

Kun li ŝi iris al Pakistano kaj tie ili renkontis en la nordaj montaroj (Nuristano ?) maljunan sufion kiu laŭ ŝi precize indikis kien ili devis iri. Tiel la paro alvenis al Tromsø kie iuj parolis al ili pri Karlsøy ; ili baldaŭ venis ekloĝi tie, en granda domo tiam kolektiva, kie ili imponis al la margenuloj per sia regula praktikado de difinita religio.

Ŝia edzo finfine forlasis ŝin kaj foriris de la insulo ; sed la datrevenon de sia naskiĝo ŝi ekpreĝis Alahon doni al ŝi novan edzon, kiel la plej belan naskiĝtagan donacon : tiun tagon mem ŝi renkontis lin kaj ili nun havas du infanojn.

Kaj sen eĉ la plej malgranda provo influi lin pri tio ĉi, post du jaroj, dum ŝi mem estis for, vojaĝanta al la sudo [de Norvegio], ŝi eksciis ke li adoptis islamon kaj komencis preĝi.

Sed ŝi insistas pri la fakto ke ŝi neniam celis konverti iun ajn, kaj ke ŝiaj ĉefaj amikoj fakte estas kristanaj kredantoj, kiel la prezidanto de la Tromsø-a Universitato, kiu nuntempe klopodas starigi en tiu kadro fakultaton pri religioj (ĉefe protestanta teologio, kaj samea religio, malfermotan probable en 1995) kaj nun preskaŭ estas, laŭ ŝi, pli arda defendanto de islamo ol ŝi mem : li efike helpas kontraŭstari al multaj antaŭjuĝoj pri tro miskonata religio.

Kion ŝi deziresprimas, pro la ekologia kaj spirita katastrofo al kiu rapide paŝas la homaro, estas unuiĝo de ĉiuj kredantoj vere engaĝitaj en spirita vojo, "kia ajn estas ilia uniformo".

(sekvota)

\* En norda Skandinavio la transiro de la tuta mallumo nokta ĝis la plena taga lumo estas tre malrapida, ofte plurhora ...kiam entute venas plena lumo, ĉar dum pli ol du monatoj oni ne vidas la sunon aperi !

# Prelego pri "Tauhid"

**Tauhid : La Unueco kaj Unikeco de la Kreinto**  
**Muhammad KAHRAMAN**

*Temas pri perkomputila sendo al esperanto-grupo (de "Internet"-sistemo) de transskribo de la islama vidpunkto en dialogo ĉe la usona universitato en Madison (Wisconsin). \**

La du parolantoj de la (anglalingva ?) dialogo, estis Muhammad Kahraman, turka islamano, d-ro fil., studento pri elektriĝa inĝenierigo ĉe la Universitato de Madison en Wisconsin, kaj Chawkat MUCHARRY, araba kristano, d-ro fil., studento pri teologio en Francio.

Ni nur bedaŭras ke la kristana vidpunkto ne estis transskribita, igante la eltiraĵon kvazaŭ longa monologo.

## Deklaro de intenco

" Invitu [ĉiujn] al la vojo de via Sinjoro per saĝo kaj bela instruo ; kaj diskutu kun ili laŭ maniero kiu estas la plej bona kaj la plej graciga." (Korano 16,125)

" Diru : Ho, Homoj de la Libro ! Konsentu kun ni ke ni adoras neniun krom Alahon ; ke ni asocias neniun kunulon kun li ; ke ni ne starigas, de inter ni, Sinjorojn kaj patronojn krom Alahon.

" Se tiam ili turnas la dorson al vi, diru : Atestu ke ni almenaŭ estas "Muslim" ["submetiĝintoj" = islamanoj] kliniĝantaj al la Volo de Alaho." (Korano 2,64)

## Enhavtabelo

1. La kreitaro kiel signo de la Unu Kreinto
2. La unueco kaj unikeco de Alaho
3. La celo de la kreado kaj la devo de la homo
4. Diskuto de timanto
5. Malakcepto de la Paŭla doktrino de la Fido
6. Kiel ni komprenas la Nomojn de Alaho ?
7. Kial la asociado de kunuloj kun Alaho estas kondamnita ?

" Je la nomo de Alaho la plej favorkora kaj kompatema."

## 1. Kreitaro kiel signo de la Unu Kreinto

Alaho diras en la Korano :

" (...) Ĉu estas ia ajn dubo pri Alaho, Kreinto de la ĉieloj kaj la tero ?" (Korano 14,10)

Tra la uzo de tiu retorika demando, ne povas kaj ne devus esti ia ajn dubo, ke la kreado de la ĉieloj

kaj tero dependas de Alaho Ĉiopova. Naturo aŭ kaŭzoj aŭ aliaj asertitaj partneroj [ aludo al la kristana Filo de Dio, dua persono de la Triunuo kaj Vorto per kiu la Patro kreas. Vidu Jn 1,1-3 ] ne havas partoprenon en la kreado de la universo.

" Kaj inter Liaj Signoj estas la kreado de la ĉieloj kaj la tero, kaj la diversecoj en viaj lingvoj kaj viaj [haŭt]koloroj ; vere, en tio estas signoj por tiuj kiuj scias." (Korano 30,22)

Per tiuj kaj multaj similaj pecetoj la Tre-Saĝa Korano prezentas la kreadon de la ĉieloj kaj la tero kiel evidentaj atestaĵoj de la Unueco de Alaho. Vole nevole ĉiu ajn konscio kaj inteligento devos aserti [la ekziston de] la Glora Kreinto pro la maniero mem laŭ kiu la ĉieloj kaj la tero estas kreitaj.

Alaho diras en la Korano, la Mirakla Raporto :

" Ĉu la nekredantoj ne vidas ke la ĉieloj kaj la tero estis kunigitaj antaŭ ol ni fende disigis ilin ? Ni faris el akvo ĉiun vivantan estaĵon. Ĉu ili do ne kredos ?" (Korano 21,30)

" La ĉielon Ni konstruis kun potenco, vere Ni disvolvas ĝin." (Korano 51,47)

La informoj prezentitaj en tiuj pecetoj de la Korano estas pli ol 14jarcent-aĝaj. Nun, hodiaŭa vera scienco estas iom post iom malkovranta tiujn faktojn.

Kiam la universo fiksas nian rigardon sur sia vizaĝo, ni unue vidas universalan ordon, kvieton, vastan kaj sentivan ekvilibron. Ĉio estas bone lokita laŭ preciza ekvilibro kaj mezuro.

Poste, oni pli atente rigardas kaj observe rimarkas ke tia precizeco en almezuriteco kaj ekvilibro fakte estas dinamika, en kontinua ŝanĝiĝo. Ĉio estas modelo kvazaŭ vestita de diversaj celhavaj skizprovoj.

Kiam oni plu studas ĝin, saĝeco kaj justeco aperas malantaŭ tiu ordigo kaj precizeco. Oni komprenas ke celo kaj profito estas intencitaj en la movo de ĉio, eĉ de la plej malgrandegaj partikloj.

Se ni pensas pri niaj malkovroj, ni ekkonscias ke ni frontas pruvon de potenco malantaŭ ege saĝa aktivado, kaj montradon de plej vasta kono, de kiu dependas la funkciado de ĉiuj aĵoj. Tio estas, Unu Potenca-Super-Ĉiuj-Estaĵoj kaj Konebla-de-Ĉiuj-Estaĵoj igas Sin mem konata al la intelekto malantaŭ la vualo de tiu ĉi universo.

(sekvota)

\* Organizita de "Interuniversity Christian Fellowship", en februaro 1992 ; sendita de Alan IRFAN la 4-an de septembro 1992 je la 22-a kaj 49 GMT.

# Bahá'u'lláh (100-jariĝo de lia morto)

Persona (...do neneŭtrala) recenzo de anonima "Deklaro preparita de la Bahaa Internacia Komunumo, Oficejo por Publika Informado en Novjorko" : Bahá'u'lláh: la tero estas nur unu lando kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj, Luksemburgio: Bahaa Esperanto-Ligo, 1992 (sen mencio de tradukinto, kvankam la originalo verŝajne estis en la angla ?), 60 p. ; sen indiko de prezo ; preskaŭ certe havebla ĉe B.E.L. (p.k. 60, L-4401 Belvaux). Bele presita en Germanio, tekst-aranĝita de "Latex".

Christian Lavarenne

La libreto prezentiĝas kiel "konciza enkonduko en la vivon kaj agadon de Bahá'u'lláh (...) preparita laŭ peto de la Universala Domo de Justeco", la kolektiva plej supera estraro de la bahaanaro. Kvankam ĝi estas multe pli ol nura biografio, mi komencu per resumeto de lia vivo.

## Biografio de Bahá'u'lláh

Mírzá Husayn 'Alí, poste nomita Bahá'u'lláh ("Gloro de Dio"), naskiĝis en Persujo la 12-an de novembro 1817. Dudeksep-jara [li havis sian unuan filon, 'Abdu'l-Bahá ; kaj la saman jaron] li fariĝis disĉiplo de Siyyid 'Alí-Muhammad, kromnomita Báb ("Pordego"), kiu tiam lanĉis spiritan kaj socian reformacian movadon, "babismon", baldaŭ konsideritan kiel revolucian kaj repremitan per masakroj de miloj da adeptoj (apenaŭ ses jarojn post la komenco de sia misio Báb estis publike ekzekutita, en 1850).

La misio de Bahá'u'lláh komenciĝis do en subtera karcero, la "Nigra Truo" en Teherano, en aŭgusto 1852, kie sonĝo donis al li la unuan inspiron pri ĝi :

" (...) la jenaj gloraj vortoj aŭdiĝis ĉiuflanke :  
*"Vere, Ni igos Vin triumfi per Vi mem kaj per Via Plumo (...) Per Via Nomo (...) Dio revivigas la korojn de tiuj kiuj rekonas Lin (...) En [tiuj] tagoj (...) Mi sentis, kvazaŭ io fluas de la supro de Mia kapo tra Mia brusto, kiel potenca torento (...) Rezulte de tio, ĉiu membro de mia korpo kvazaŭ ekardis. En tiaj momentoj Mia lango citadis kion aŭdi neniu homo povus elteni."*

Post kvar monatoj li estis ekzilita al Bagdado (Irako, tiam parto de la Otomana Regno), kie li provis reorganizi la tiean babanan komunumon ; sed li baldaŭ "retiriĝis en la sovaĝejon" en Kurdistano dum du jaroj, pro la sekreta kontraŭstaro de sia juna duon-frato, Mirzá Yahyá kiun Báb estis nomuminta kiel estron de la babana komunumo, kaj kiu rifuzis akcepti la postan deklaron de Bahá'u'lláh en 1963 en la ĝardeno Ridván ("Paradizo").

Ĉar la tagon antaŭ sia foriro (la 3-an de majo) al nova ekzilejo en Konstantinopolo, tiu ĉi kunvokis kelkajn kunulojn por "konfidi al ili Sian mision" kaj malkaŝi ke la "Tago de Dio (...) kiun ĉiuj profetoj, ĉiuj Elektitoj kaj la sanktuloj deziris travivi" estas nun alveninta.

De la ĉefurbo de la Otomana Regno, kie eĉ la ĉefministro ekhavis simpatian por tiu (surpapere) gasto de la turka registaro, laŭ siaj propraj vortoj "viro de granda eminenteco, modela konduto, granda modereco, kaj tre digna persono", Bahá'u'lláh estis baldaŭ sendita, pro premo de la persa ambasado, al Andrinopolo kie "la ekzilitoj eltenis jaron de grandaj suferoj".

Tie li verkis siajn "epistolojn" al la "Reĝoj kaj Regantoj de la tero" (inkluzive, pli poste, de la Papo Pio la IX-a, Napoleono la III-a, ktp.) , por ke ili kunlaboru en la starigo de la "Plej Granda Paco", mŝordo karakterizota per unueco kaj inspirita de dia justeco. Sed lia vizio "alvokis neniun reagon de la regantoj de la 19-a jarcento".

Sed ankaŭ tie rapide okazis ke "du el el la plej sindonaj admirantoj estis (...) la provincestro kaj (...) la gvidanta sunaisma altrangulo". Malgraŭ aŭ pro tio \* , "sen averto, iumatene la domo de Bahá'u'lláh estis ĉirkaŭita de soldatoj, kaj oni ordonis al la ekzilitoj prepari sin por forveturo al nekonata celo". Tiel ili alvenis al sia definitiva ekzilejo, Akko\*\*. Tie li perdis Mirzá Mihdi, 20-jaran alian filon, sur kiu falis en 1870 la prizona tegmento.

En 1877 la punkondiĉoj finfine iom mildiĝis, eble ne sen rilato kun la morto de la sultano, murdita en palaca ribelo. Bahá'u'lláh rajtis eliri la prizonan citadelon por fini sian vivon en najbara kampara domo ĉirkaŭita de ĝardenoj, daŭre dediĉigante al la verkado de siaj skriboj, kaj "al la akcepto de fluo de bahaaj pilgrimantoj".

Li forpasis la 29-an de majo 1892 en sia 75-a jaro.

## Pli ol nura biografio

Sed la libreto estas multe pli ol nura priskribo de biografiaj eventoj. Ĝi ĉefe prezentas la verkon de la fondinto de la bahaa kredo kaj movado, kies "kreskanta influo estas la plej rimarkinda disvolviĝo de la nuntempa religia historio".

Kaj ĝi celas montri ke li enviciĝas inter la profetoj de Dio, kiujn cetere, laŭ li mem "oni rigardu kiel kuracistojn kies tasko estas progresigi la bonfarton de la mondo kaj ĝiaj [=ties] popoloj, tiel ke per la spirito de unueco ili kuracu la malsanecon de dividita homaro (...) Nenia miraklo do, se la terapio preskribita de la kuracisto en tiu ĉi tago ne montriĝas identa al tiu kiun li preskribis antaŭe (...)".

Sed nebahaano malfacile povos akcepti la tiom ampleksan gravecon kiun li mem donas al ilia (kaj do ankaŭ sia) rolo :



" *Kaj eĉ ĉiuj aliaj [homoj] krom tiuj Manifestiĝoj [de la Suno de l'Vero] vivas per la efiko de ilia Volo, kaj moviĝas kaj havas sian estadon pro la elverŝoj de ilia graco.*"

Kaj verŝajne nek kristanoj nek judoj nek islamanoj ktp. povos facile akcepti tiun deklaron de la Bahaa Internacia Komunumo, laŭ kiu :

" *Li estas la promesito de ĉiuj sanktaj skriboj se la pasinteco, la "Deziro de la nacioj", la "Reĝo de la Gloro". Por Judaismo Li estas la "Sinjoro de la ĉielularo"; por Kristanismo la Reveno de Kristo en la gloro de la Patro; por Islamo la "Granda Anonco"; por Budhismo la "Majtraja Budho"; por Hinduismo la nova enkorpiĝo de Kriŝno (...)*"

Kvankam li mem verŝajne estis pli humila ol siaj disĉiploj, deklarante ekzemple :

" *Iuj el inter vi diris : 'Li estas tiu kiu pretendis esti Dio'. Je Dio ! Tio estas kruda kalumnio. Mi estas nur servanto de Dio, Kiu kredis je Li kaj je Liaj signoj...'*"

Eĉ se li estas preskaŭ certe venerinda mistikulo, precize kiel ĉiuj veraj (la ununura escepto ŝajnas esti Jesuo), ĉu li mem ne rekonis humile sian neperfektecon, skribante :

" *Kiam mi kontemplas, Ho mia Dio, la rilaton kiu ligas min al Vi, mi emas [eble eĉ la traduko devus esti emus ?] proklami al ĉio kreita 'vere mi estas Dio !' ; kaj kiam mi konsideras mian propran memon, jen mi trovas ĝin pli kruda ol argilo !"*

Mia lasta kontestadeto estos pli historia. Ŝajnas al mi iomete mallerta la jena pretendeto :

" *kiel la sola el la sendependaj mondreligioj la Bahaa Kredo kaj ĝia komunumo de kredantoj sukcese trapasis la krizan unuan jarcenton de sia ekzisto kun sendifekta unueco, ne damaĝita de la praaĝa pesto de skismo kaj disdivido.*"

Unue, kvankam mi tute ne estas fakisto pri la historio de la unuaj jarcentoj de kristanismo kaj do povis preteratenti ion, ŝajnas al mi ke ankaŭ dum la unua jarcento, ankoraŭ ne estis tiaj skismoj aŭ disdividoj. Ĉar kion la tradicio nomis la unua koncilio en Jerusalemo, kie Paŭlo kaj Barnabas alfrontis kristanajn kredantojn devenantajn el la sekto de la Fariseoj, pri cirkumcido kaj observo de la leĝo de Moseo, tiu paca esplorado pri nedifektiga konflikto finiĝis en unuanimeco. (Vidu, en la Agoj de Apostoloj, la tutan ĉapitron 15 kaj speciale 15,25 kaj 15,28).

Kaj almenaŭ ĉe la komenco mem de la bahaa kredo, kiam ekformiĝis la komunumo de kredantoj, ĝuste tiam okazis skismo.

" *Tie ĉi Bahá'u'lláh rekomencis Sian instruadon kaj arigis ĉirkaŭ Si grandan sekvantaron. Li publike anoncis Sian mision kaj estis entuziasme akceptita de plimulto de la babanoj, kiuj post tio iĝis konataj kiel bahaanoj. Tamen, malplimulto sub la gvidado de la duonfrato de Bahá'u'lláh, Mírzá Yahyá, ekkontraŭstaris Lin furioze kaj unuiĝis kun siaj iamaj malamikoj, la ŝijaistoj, por konspiri por Lia faligo. Sekvis grandaj malfacilaĵoj (...)*"

La argumento estas do ne tute konvinka, kaj eĉ iomete seniluziigas ĉe la fino de tiel bela libro, en kiu oni ŝatis ĝuste ke "la agresema prozelitismo kiu karakterizis en la pasinteco la klopodojn antaŭenigi religion, estas deklarita kiel maldeca (...)" . Ĉar neniu neos, desmalpli mi, ke kutime la bahaanoj vere sukcesas mirinde plenumi la konsilon de Bahá'u'lláh : "Interrilatu kun la sekvantoj de ĉiuj religioj en spirito de afableco kaj frateco".

Kaj asocio pri religi-komparado kiel ASISTI povus laŭ mi akcepti kiel sufiĉe taŭgan gvidilon en sia studado la jenan deklaron de la Bahaa Komunumo :

" (...) la adeptoj de malsamaj religiaj tradicioj devas klopodi kompreni kion Li nomis "la sensanĝan Kredon de Dio" kaj distingi ĝian [=ties] centran spiritan impulson disde la ŝanĝigantaj leĝoj kaj konceptoj (...) Ne nur la koro sed ankaŭ la racio devas dediĉi sin al tiu ĉi procezo de malkovro (...) Nur se la racio liberigas sin de heredita dogmaro, ĉu religia ĉu materialisma, ĝi povas entrepreni sendependan esploron (...)" ;

kaj ĉefe la emon provi kompreni de interne la vidpunkton de malsamkredantoj, sekvante ekzemple tiun dian (aŭ almenaŭ saĝan) konsilon komunikitan de Bahá'u'lláh :

" (...) ili ne rigardu per okuloj tro kritikemaj la eldirojn kaj skribojn de la homoj. Prefere ili proksimiĝu al tiaj eldiroj kaj skriboj en spirito de senpartieco kaj ama simpatio."

### Konkludo

Mi tute ne intencis provi taksi kiu finfine estis Bahá'u'lláh. Kaj per la venonta citaĵo mi celas malpli montri ke li iel similas al pluraj profetoj de la Biblio kiuj fariĝis tiaj pli malpli kontraŭvole (Vidu Jeremia 1,6 , kaj ĉefe Jona, ktp.) , ol kiom kortuŝa estis lia fideleco al Dio kiam oni memoras ke pro ĝi li pasigis preskaŭ 40 jarojn en malliberejoj aŭ ekzilejo : **almenaŭ, certe li estis sincera !**

" Ĉu vi kredas, ho homoj, ke Mi havas kontrolon super la definitiva Volo kaj Intenco de Dio ? ... Se la fina sorto de la Kredo de Dio estintus en Miaj manoj, Mi neniam estus konsentinta, eĉ ne por unu momento, manifesti Min al vi, nek Mi estus permesinta ke unu vorto transvenu Miajn lipojn (...)"

Mi finos deziresprimante por esperanto, ke li vere estintu profeto, pro tiaj jenaj belegaj profetaĵoj \*\*\* :

" *La tago alproksimiĝas, kiam ĉiuj popoloj de la mondo akceptos universalan lingvon kaj komunan skribon. Kiam tio estas atingita, ĉiu homo, kiun ajn urbon li vizitos, kvazaŭ eniros en sian propran domon... Tiu vere estas homo, kiu hodiaŭ dediĉas sin al la servo al la tuta homaro... La tero estas nur unu lando, kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.*"

\* Sed eble ankaŭ pro "konspiro" de la duon-frato Yahyá, ĉar de tiam la daŭremaj babanoj kaj la bahaanoj mem definitive disiĝis : la unuaj estis senditaj en Cipron. (Vidu J.E. Esslemont, Bahá'u'lláh kaj la nova epoko, tradukita de Lidja Zamenhof, BEL, 1978, p.42)

\*\* Aŭ [Sankta-Johano-de-]Akreo en Palestino, nuntempe Hajfa.

\*\*\* Kvankam li mem neniam menciis esperanton mem, lia filo kaj posteulo kiel ĉefe de la bahaa komunumo, 'Abdu'l-Bahá, nomis ĝin kaj petis ĉiujn, do certe unue ĉiu bahano, lerni ĝin :

" (...) *Esperanto fariĝos universala. Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo...*" ( En la parolado je la 12.02.1913 en Parizo (ĉe "Hôtel Moderne"), reprod. en Esslemont, samloke p.165).

Ni ricevis de la tradukisto unu ekzempleron de La nekredebla paradokso de Vinson Brown, tradukita de Darlene Evans el la angla ("The incredible paradox", 5-a eld.), Happy Camp (Kalifornio) : Nature graph Publishers, 1992, 62 p. (1-a eld. dulingva angla-esperanto). Prezo 6.95 \$, ISBN 0-87961-225-8 (P.O.Box 1075, Happy Camp, CA 96039, USA). Ĝi estas verŝajne havebla ankaŭ de Bahaa Esperanto-Ligo. Ni provos recenzi ĝin en venonta numero.

## Leteroj de legantoj

Letero de Monsinjoro Jakubinyi György (Rumanio)

Alba-Julia, la 22-an de junio 1992

Elkoraŭ dankon por Asistilo n-ro 10, printempo 1992, kun la artikolo pri mia sinoda propono.

Mi bondeziras al vi la Vojon, Veron, Vivon, kiu estas KRISTO ! Kun danko, via

+ Jakubinyi György, help-episkopo

Responde al la letero de D.Pfeiffer (en Asistilo 10)

Sur p.21 estas citita parto el letero de D. Pfeiffer el Francio pri via artikolo en Monato pri ASISTI kaj "Kosma Ekumeno" (...)

Laŭ la citita fragmento mi deduktas ke "Kosma Ekumeno" strebas "altrudi religian solvon". Sed tio

### Esperanto : universala helplingvo por la Bahaa Kredo ?

Sub tiu ĉi titolo, intence aŭ ne ekzakte tiun ĉi jaron, sanktan por la bahaanoj, nebahaa franca mondcivitano, kun helpo de fondaĵo, ĵus aperigis en kvin naciaj lingvoj (franca, germana, angla, hispana kaj portugala) 16-paĝan prezenton de esperanto por la bahaanoj, kun i.a. baza enkonduko al la gramatiko kaj ĉefe citaĵoj de Bahá'u'lláh, 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi la posta Gardanto de la Kredo, kiuj instigas ĉiun bahaanon lerni kaj disvastigi esperanton laŭ sia eblo. Rimarkinde, cetere, ke Zamenhof mem, kies filino Lidja fariĝis bahaanino, skribis : "*La Bahaanoj komprenas, pli bone ol ĉiu alia gento, la internan ideon de Esperanto*".

Ni invitas do ĉiun bahaanon mendi ekzemplerojn de tiu broŝuro (kompostita dank'al komputilo de la bahaa centro en Parizo se mi bone memoras) en unu aŭ pluraj el tiuj kvin naciaj lingvoj, por siaj ankoraŭ ne esperantistaj samkredantoj, al :

Philippe CHAVIGNON, 22 route de Blois,  
F-41130 Selles-sur-Cher, Francio  
10 ff por unu ekzemplero (25 ff kun sonkasedo).

Kial ne partopreni en la sanktigado de la centjariĝo decidante aŭ decidigante bahaajn amikojn eklerni esperanton laŭ la konsilo de la Universala Domo de Justeco :

"(...) *ni opinias ke estus bone ke la eŭropaj bahaanoj intensigu sian kunlaboradon (...) lernante Esperanton kaj aktive partoprenante en la agadoj de la esperantista movado.*" (Letero je la 18-a de septembro 1986).

estas miskompreno. Ĝi ja celas nur - laŭ vortoj de Komenius [kiun mi reproduktis] en La vojo al harmonio, p.6 - esti "spirita suno antaŭ kies brilo kaj varmo nenio povas eĉ ne volas kaŝiĝi".

D. Pfeiffer skribas ke li estas ateisto sed interesiĝas pri religio. Tio estas pruvo ke la ideo de kosma ekumeno estas ĝusta. Ĝi volas altrudi neniun religion, sed vekti intereson pri baza religia sento ĝuste ĉe nereligianoj.

Jaroslav Karhan, CS, 27-6-92

Kara Samideano,

Mi estas 24-jara usona judo. Mi partoprenis kiel aktoro en la Festivalo de Teatro en Edinburgh (Skotlando) kun la Ĉikaga teatro-grupo "Elmore Pond Players" (...) Mi ankaŭ interesiĝas pri orientalismo kaj religio kompara. Mi legis librojn de persaj aŭtoroj, kaj aliaj islamaj (...) Sincere

Yahale Yadede (Chicago)

## Verŝajne la unua IKUE-Kunveno en Rumanio ...kun ortodoksa prezidanto de la nacia sekcio

Oficiale ĝi estis renkontiĝo de la rumanaj IKUE-anoj, fonda renkontiĝo [de la rumana sekcio de IKUE, kaj] la unua kongreso enlanda. Sed ĝi estis ankaŭ ekumena renkontiĝo (...) ĉar el inter la 37 [ĉeestantaj ?] membroj (el la tuto da 45), 13 nomas sin ortodoksoj kaj unu protestanto. Kiel prezidanton oni elektis S-ron Vasile Albu, ortodokson. Sekve IKUE havos por la unua fojo buntan filion! [Tamen] la plimulton konsistigis la katolikoj. (...)

Komence de la pasinta jaro ĉi-filion estigis M-ro G. Jakubinyi (episkopo), P-ro D. Teleky, S-ro V. Albu kaj S-ino Irene Szücs. M-ro Duilio Magnani, ĵus ekŝinginta prezidanto de IKUE, kune kun la paroĥanoj de Rimini, helpis la nove "baptitajn" IKUE-anojn el Rumanio per la kolekto de 1.500.000 liroj italaj.

Verdire oni ne havis ion pri kio disputi inter si, nek kiel kristanoj [el diversaj Eklezioj] nek kiel malsamlingvanoj [la rumana kaj la hungara]. Sekve oni ne diskutis nur pri religio, eĉ pli, oni pli fervore diskutis pri la varbado de pliaj esperantistoj. (...) En la unua tago oni babilis kvar horojn pri la historio de la Esperanto-movado ĉe la katolikoj kaj ortodoksoj, pri la ekumenaj okazaĵoj en Esperantio jam aperigitaj en la antaŭaj numeroj de Asistilo, pri la malmultaj [? tiele] estontaj taskoj.

En katolika preĝejo de la urbo Alba-Iulia (sude de la urbo Cluj/Kluĝo), kie okazis la kunveno, oni partoprenis la matenajn mesojn **celebritajn** ankaŭ en Esperanto. (La renkontiĝon ĉeestis la plej maljuna esperantisto rumana, 87-jara, esperantiĝinta en 1922, S-ro Ploiaș).

### Pri kristanismo kaj aliaj religioj, (C. Galeriu, ortodoksa pastro)

A.P.: La katolika teologo **Henri de Lubac** provas trovi resuman bildon pri religioj: li vidas ilin kiel montojn, el inter kiuj unu estas pli alta el la aliaj, t.e. kristanismo. **Mi kredas ke ekzistas ununura monto kun multaj alirejoj.** Ekzistas diversaj dekli-voj kaj vojetoj baritaj. Mi kredas ke estas malprava la bildo de kristanismo kiel ĉepinta religio, prava estas tiu de suprenirinta religio. Do monto kiu estas solsula vero, kun diversaj alirejoj alpintaj. Mi ne kredas ke mi povas salteti de vojeto al vojeto...

P-ro Galeriu: Jene ni povus respondi. Ĉe la Sanktaj Patroj estas du teniĝoj; mi proponas la unuan kiel kuntekston kaj la alian kiel malferminta universalan perspektivon.

Jen la unua:

Sankta Pahomio havas jenan vizion: pri ebenaĵo, kvazaŭ kampo en duonmalhelo, surhavinta kolonojn inter kiuj sin movas homoj kiuj ŝajne antaŭeniras sed fakte rondmoviĝas. Kaj jen vojo de lumo, sur kiu la spirita majstro [Pahomio] vidas sian komunumon, kaj ĉiuj alkriĉas: "Ĉi tie la vero!" Kelkaj el liaj disĉiploj intencas devojiĝi sed Pahomio alvokas ilin: "Kunteniĝu kaj sekvu min!"

Mi nomis ĝin kunteksta vizio ĉar ĝi okazas en la tempo de la batalo kontraŭ herezoj.

La dua vizio malfermita al la universalulo, apartenas al Abba Doroteo:

"Imagu al vi cirklon en kies centro staras Kristo, kiel Suno de justeco. El la suncentro al la randoj kaj ree disiĝas la radioj. Ĉi-radioj estas egale lumamaj kaj diamaj vojoj. Ĉiu laŭiras sian radion. Des pli vi alproksimiĝas al la ŝuno, al la centro, ju pli alproksimiĝas vi al ceteraj radioj, aliuloj. Des pli malproksime de la Centro, ju pli malproksime de viaj aliuloj."

NE forgesi ke ni ne povas identigi la instruon pri Alaho kun la instruo pri la Sankta Triunuo ĉar laŭ la maniero laŭ kiu Dio revelaciis sin al ni, lernas ni la Vojon. Ĉar, ĉu mi estas budhano, ĉu mi estas mahometano, mi demandu min ĉu mi staras aŭ ne en la vero?

Kaj samtempe ne forgesu ke en ĉio ekzistas vojo kaj al ĉiu turnas sin iu dia pedagogio kiu laboras senĉese sen subigi la konsciencon.

\* Fragmento esperantigita de Nic. Macovei el la rumana libro "Vesperaj dialogoj", C. Galeriu kaj kunaŭtoroj, Bukareŝto, 1991, (150 p.).

### Al Lia Papa Moŝto Johano-Paŭlo II-a (10-6-92)

Ni membroj de la Rumana Sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), okaze de nia renkontiĝo unua en Alba Iulia, ricevis sciigon pri tio ke Vi, la 15-an kaj 16-an de aŭgusto 1991 en Pollando, alparolis per kelkaj vortoj en la internacia lingvo Esperanto al la 6-a [neesperantista] Tutmonda Junulara Renkontiĝo.

Nun kiam la tuta kristanaro proksimiĝas, kiam la ekumenismo evoluas, kaj komuna neŭtrala lingvo estas forte bezonata, ni trovas tre oportunaj Viaj mesaĝoj. Ĉar la latina lingvo, kun tre malfacila gramatiko, estas pli kaj pli malmulte praktikata, la plej bona solvo estas la neŭtrala lingvo Esperanto.

Esperante la tagon kiam ĉiuj kristanoj per unu komuna lingvo preĝos al nia Patro, al Dio, ni esprimas tutkorajn dankojn al Vi.

Akceptu, ni petas Vin, nian sinceran tutestimon.

En la nomo de 45 rumanaj IKUE-anoj, la Landa Rezentanto de IKUE por Rumanio, **Vasile Albu**

## Jarkunveno dum UK en Vieno, 27-7-1992

Post malfermo kaj saluto far la prezidanto, S-ro Yoŝimi Umeda, prezento de la tagordo far Bernhard Westerhoff : A. Asistilo ; B. Religia Antologio ; C. ASISTI-reprezentiĝo en ekster-esperantio ; D. Cetero / Kasisto

### A. Asistilo

Christian Lavarenne prezentas la bultenon kaj ties celojn kaj problemojn, post kio pli ol manpleno da komentoj kaj rimarkoj pri Asistilo venas el la publiko. Emfazata estas la nepra plua observo de plena malfermeco al ĉiuj opinioj. La opinio ke lukso ne gravas opozicias la deziron ekhavi teknike pli kvalitan gazeton.

Sekvas iom enŝove la sinprezentado de ĉiu kunven-partoprenanto.

### B. Religia Antologio

S-roj Y. Umeda kaj Ch. Lavarenne raportis pri la aktuala, ankoraŭ tre frua sed tamen jam iom stagna stato de la afero. Grava problemo estas la redaktokriterioj, resp. kion kaj kiel elekti. Konkurenco la deziro je malfermeco kun tiu limiĝi je la vere grava, kaj la bezono ne tro multpaĝiĝi. Solvo ne trovitas. (vidu ankaŭ ĉi-apude)

### C. Reprezentiĝo

B. Westerhoff esprimis sian opinion ke ASISTI (-anoj) ankaŭ devus okupiĝi pri reprezentiĝo en eksteresperantaj interreligiaj aranĝoj, ekzemple la "Mondaj Kongresoj pri Religio kaj Paco" (WRPC, laŭ la angla nomo, vidu en Asistilo n-ro 3, p.36-38). Tio trovas konsenton. S-ro Umeda tiucele uzos siajn kontaktojn al la MKRP-organizo ; kaj B. Westerhoff provos kontakti alian organizon kun sidejo en Frankfurt (Germanio) [Internacia Asocio por Religia Libereco, IARF laŭ sia angla nomo, kiu kongresos en Hindio en 1993].

D. Klarigatis la situacio pri la kasisto de ASISTI kaj aprobiĝis Ch. Lavarenne kiel la nova [provizora!].

## Estrarkunsido sekve de la jarkunveno

*Ĉeestis Y. Umeda, Ch. Lavarenne, B. Westerhoff*

Pri Antologio S-ro Umeda turniĝos al S-ro Nordenstorm en la senco ke li petos kiom eble baldaŭan prezenton de konkreta enhavstrukturo por ke tiu povos esti diskutata, kaj serĉataj la kontribuantoj.

Pri Asistilo, estas preparolataj kelkaj vojoj por plicertigi kaj eĉ plibonigi la financan, teknikan kaj enhavan situacion de la bulteno. La redaktoro estu plene libera en siaj klopodoj eluzi la eblojn. [Jam vi vidas unuajn ŝanĝojn kun tiu ĉi numero : nova formato...]

La programo por la sekvataga IRKE preparolatis kaj konfirmatis.

Protokolis B. Westerhoff, 30-7-1992

(1) Mia propra memoro pri la interparolo estas iomete malsimila : Leif Nordenstorm estas la respondeculo de la "komisiono", al kiu povas aliĝi ĉiu kiu deziras partopreni en ĝi ; li jam proponis ekzemplon de strukturo en Asistilo n-ro 5, p. 15, kaj akceptis la esprimatajn rimarkojn (vidu n-ron 6, p.55 kaj n-ron 8 p.56-57); kaj nun oni serĉas nur pliajn eventualajn kontribuantojn pretajn science traduki pecojn kiujn ili mem povos elekti laŭ la konsiloj de la respondeculo/ĉefredaktoro Leif.

La denove prezentita propono de Bernhard, traduki jam ekzistantan tian antologion (do eĉ ne de la originala lingvo sed de la lingvo de la antologio) ne konvenas al la unua ideo fari originalan kaj sciencan verkon, almenaŭ en ties ĉi-koncepto : ke la religiaj aŭ spiritaĵaj tekstoj estu tradukitaj rekte de la originalo, far kredantoj de tiu religio kaj, laŭeble, samtempe parolanto de la originala lingvo (aŭ fakisto pri tiu lingvo se temas pri ne plu parolata lingvo).

Mi eĉ kaptas la okazon por, denove, deziresprimi ke ĉiu teksto estu dulingva : en la originalaj lingvo kaj skribo (plus eventuale transskribo en latinaj literoj), kaj en esperanto. Esperanto tiel vere ludus sian rolon de pontlingvo kiu donus al ĉiu la alireblecon al la teksto mem, tiel grava en religiaj aferoj. (Kaj tio certe ankaŭ pligrandigus la emon aĉeti la libron, kaj do la nombron de aĉetontoj, pro la "bibliofila" plezuro povi admiri nekutimajn skribojn el la tuta mondo : araba, ĉina, hebrea, japana, palia, sanskrita, tibeta...)

Christian Lavarenne

## (2) : jam unu stupo

"Religia Antologio", pri kiu ni jam kelkfoje diskutis en Asistilo, estas grava projekto de ASISTI. Tuj post kiam mi ricevis la taskon kunordigi la laboron pri la antologio, mi ricevis alian taskon de la sveda sekcio de KELI : redakti novan eldonon de Religia literaturo en esperanto, eldonita en 1970 (35 A-4 paĝoj), kunigante la originan libron kun 27 suplementoj aperintaj ĝis 1989, kaj kompletigante ĝin per eldonoj post 1989.

Mi laboras pri tiu ĉi Religia literaturo en esperanto. Apude vi trovos ekzemplon de rubriko en la libro. Dum 1992 kaj 1993 mi dissendas la ĉapitrojn, kiel ekzemple tiun ĉi pri islamo, al fakorganizaĵoj, fakdelegitoj k.a., demandante ilin, ĉu ili trovas erarojn aŭ havas kompletigojn.

Kiam Religia literaturo en esperanto estos preta, ĝi ege faciligos la kunigon de la projekto Religia Antologio.

Leif Nordenstorm

## RELIGIA LITERATURO EN ESPERANTO: STUPO SURVOJE AL RELIGIA ANTOLOGIO.

Jen ekzemplo pri unu rubriko de "Religia literaturo en esperanto". Nek la bibliografio, nek la kroniko estas finredaktita. Korektoj kaj kompletigoj aldoniĝos.

### Islamo

- Elektitaj versoj el la Sankta Korano. Eld: Ahmadiyya-Movado en la Islamo. Den Haag NL 1988. 124 p. ĝ
- Islamo, ĉies religio. De Mohammed Taufiek Ahmad. Trad: E. Vinfero. Eld: Dar Tab-legh-El-Islam. Kairo Egiptio. 16 p. ĝ
- Islamo esperantiste rigardata. De Colin Evans. Eld: Islama Koresponda Rondo. London GB. 1946 32 p. ĝ
- Islamo, religio de amo, toleremo, libereco. Artikolserio de Italo Chiussi en Biblia Revuo ekde 4/69. Ravenna I 1969-. ĝ
- Je la flanko de la profeto. De Italo Chiussi. Eld: TK. Kopenhago DK 1973 ĝ
- Kial mi kredas je l' islamo. De Hazrat Mirza Baŝiruddin Mahmud Ahmad. Trad: I. Chiussi. Eld: Ahmadiyya Misio. Frankfurt/M D 1969. 16 p. ĝ
- La islamismo. De Prof. Aghostino da Silva. Trad el la portugala: Manuel de Freitas. Eld: Portugala Eldona Rondo. Porto P 1982. 22 p. ĝ
- La nobla korano. Paralelaj tekstoj araba kaj Esperanta. Trad: I. Chiussi. Eld: TK. Kopenhago D 1969. 675 p. ĝ
- Pri la sankta korano. Poemo Esperanta kaj angla. De Al-Amily. Dediĉita el H. Beechy. 1968. 1 p. b

### Kroniko:

Partoj el la Korano kelkfoje aperis en la esperanta gazetaro, i. a. en "Esperanto Internacia", dum la dua mondmilito. Post la milito stariĝis en Britujo la "Islama Koresponda Rondo" (IKRO). Dum la UK en VARsovio (1959) fondiĝis "Tutmonda Islama Esperanto-Asocio". En 1969 finiĝis la unua esperanto-kurso por islamaj pastroj kaj orientalistoj, nome en Medresa de Sarajevo, Jugoslavio. La islamano diservon dum la Londona UK (1971) partoprenis, predikante, Sir M. Zafrulla Khan, neesperantisto, eksministro de Pakistano, prezidinto de la 16-a sesio de UN, prezidanto de Internacia Kortumo en Hago. Kiel supozigas jam la supra listo de literaturaĵoj, nuntempe plej signifa islama esperantisto estas D-ro Italo Chiussi, kies traduko de la Korano ricevis altan laŭdon kaj kiu estas la portempe sola fakdelegito.

# Citadelo de Antoine de Saint-Exupéry

## Homo ekzistas nur per sia animo

Iuj, por ke mi miru pri ilia urbo, kuntiris min kun si (...) kaj kondukis min al la templo. Kaj mi eniris, kaptite en la silento kaj la ombro kaj la malvarmeto. Tiam mi meditis. Kaj mia meditado aspektis al mi pli grava ol nutrado aŭ konkero. Ĉar mi estis nutrinta min por vivi, mi estis vivinta por konkeri, kaj mi estis konkerinta por reveni kaj mediti kaj senti mian koron pli vasta en la ripozo de mia silento.

" Jen estas", mi diris, " la vero pri la homo. Li ekzistas nur per sia animo. Estren de mia civito mi instalos poetojn kaj pastrojn ; kaj ili ekflorigos la koron de la homoj." (...)

## Homo estu pli humana

Tial mi venigis la instruistojn, kaj mi diris al ili:

" Vi ne estas komisiitaj mortigi la homon en la homidoj, nek ŝanĝi ilin en formikojn por la vivo de l' formikejo.

" Ĉar ne gravas por mi, ke la homo estu pli aŭ malpli kontentata. Kio gravas por mi, tio estas, ke li estu pli aŭ malpli homo. Mi ne demandas unue ĉu la homo, jes aŭ ne, estos feliĉa, sed kia homo estos feliĉa (...)

" Vi ne plenplenigu ilin per formuloj, kiuj estas malplenaj (...) Vi ne plenigu ilin per mortaj scioj (...)

- Kaj ja scias ni ĉiuj, kiom la rezonadoj estas trompaj. Kiujn oni rigardas la plej lertaj argumentoj kaj la plej devigaj pruvoj, tiuj ne ĉiam sukcesas konvinki : "Jes, ci pravas", komenciĝas la respondo, "kaj mi tamen ne samopinias kun ci..." Kiuj tiel parolas, tiujn multaj taksas stultaj. Sed ni scias ke ili estas ne stultaj, sed male, la plej saĝaj. Ili respektas veraĵon ne veturigatan de la vortoj.

Ne igu ilin imagi al si ke la mondo enteniĝas en la vortoj, kaj ke la homa parolo esprimas la universon kaj la stelojn kaj la feliĉon kaj la subirantan sunon kaj la bienon kaj la amon kaj la arĥitekturon kaj la silenton...-

" Vi ne taksu iliajn kapablecojn laŭ ilia sola ŝajna facileco en tiu aŭ alia direkto. Ĉar tiu iras plej malproksimen kaj sukcesas plej bone, kiu plej multe laboris kontraŭ si mem.

" Vi do unue taksu laŭ amo." (...)

" Vi instruu meditadojn kaj preĝadon, ĉar tie la animo fariĝas vasta ; kaj la ekzercadon de amo. Ĉar kio anstataŭigus ĝin ? Kaj sinamo estas la kontraŭo de amo."

- Mi petas cin vivi ne el tio kion ci ricevas, sed el tio kion ci donacas, ĉar nur tio pligrandigas cin. Kaj tio ne

devigas cin malestimi kion ci donas. Ci devas formi cian frukton. -

" Spertigante ties guston vi veku la emon al la perfekto, ĉar ĉia verkado estas alpaŝo al Dio, kaj nur en la morto ĝi povas finiĝi."

## La amiko

La amiko estas unue tiu kiu ne juĝas. Mi diris tion al ci, li estas tiu kiu malfermas sian pordon al la vojvagujo, al lia lambastono, al lia bastono elmetata en iu angulo, kaj kiu ne petas lin danci por juĝi lian dancon.

Kaj se la vojvagujo rakontas la printempon sur la vojo de l'ekstero, la amiko estas tiu kiu akceptas en sin la printempon. Kaj se li rakontas la hororon de la malsatego en la vilaĝo de kie li venas, la amiko suferas kun li la malsaton.

Ĉar mi diris tion al ci, la amiko, tio estas la parto kiu estas por ci, kaj kiu malfermas por ci pordon kiun eble li neniam malfermas aliloke. Kaj cia amiko estas vera, kaj ĉio kion li diras al ci estas vera ; kaj li amas cin eĉ se li cin malamas en la alia domo.

Kaj la amiko en la templo, tiu kiun dank'al Dio mi alkubutiĝas kaj renkontas, estas tiu kiu turnas al mi la saman vizaĝon kiel la mia, prilumatan de la sama Dio; ĉar tiam la unueco estas farita, eĉ se aliloke li estas butikisto kaj mi kapitano, aŭ ĝardenisto kaj mi maristo sur la maro.

Super niaj dividiĝoj mi trovis lin kaj estas lia amiko. Kaj mi povas silenti proksime de li, t.e. nenion timi de li pri miaj internaj ĝardenoj (...)

Kie ci vidis min, dum mi akceptis ambasadorojn, teni ilin flanke aŭ ilin malakcepti ĉar funde de ilia imperio, je mil tagoj da piedirado de la mia, oni nutras sin per manĝaĵoj kiuj ne plaĉas al mi, aŭ ĉar iliaj moroj ne estas miaj ?

Amikeco estas unue la militpaŭzo kaj la granda moviĝado de l'spirito super la trivialaj detaloj. Kaj mi nenion kapablas riproĉi al tiu kiu tronas ĉe mia tablo.

Ĉar sciu ke gastamo kaj afableco kaj amikeco estas renkontoj de homo en homo. Kion mi irus fari en la templo kun dio kiu diskutus pri la staturo aŭ la ventrodikeco de la fideluloj, aŭ en la domo de amiko kiu ne akceptus miajn lambastonojn kaj pretendus igi min danci por juĝi min ?

Ci renkontos ja sufiĉe da juĝistoj tra la mondo (...) Cia amiko estas farita por akcepti cin.

Sciu pri Dio, kiam ci venas en Lian templon, ke Li ne plu juĝas cin sed cin akceptas.

Eltiraĵoj trad. de Antono MECHELYNCK, kiu ektradukis la tutan verkon (eble jam 115 p. provtradukitaj!). La red. bedaŭrinde devis elekti el inter la 11 p. proponitaj...

Letero al la direkcio de ORF [radioelsendejo] Wien,  
de J. Karhan, CS

Olomouc [CS], 25-9-1992

Olomouc, 31-8-92

Estimataj,

En la Viena Aŭstria Centro okazis fine de julio 1992 la 77-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis pli ol 3.330 homoj, de plej diversaj intereso, el 67 landoj de la tuta mondo, kiuj senprobleme interkompreniĝadis. Tiu ĉi Esperanto-kongreso fariĝis - en maro de tutmondaj malakordoj - mikromodelo de internacia harmonio.

Ĝiakadre okazis ankaŭ kunvenoj de diversaj religioj (kristanaj kaj nekristanaj) kaj komuna kunveno interreligia. (...) Estis esprimitaj deziroj tutmonde intensiigi la interreligiajn dialogojn kaj universaligi la ekumenan movadon por ke religioj ne plu estu kaŭzoj de malakordo, sed fontoj de harmonio.

Plie estis konstatite ke ORF disaŭdigas eminentajn - germanlingvajn - interreligiajn kaj ekumenajn programojn ("*Religion aktuell*", "*Welt der Religion*" k.a.) kaj esprimitaj deziroj ke iliaj plej gravaj eroj aŭ resumoj estu disaŭdigataj ankaŭ esperantlingve kaj tiamaniere popularigitaj mondskale (...)

Tial mi prezentas proponon ke vi envicigu en vian kurtondan disaŭdigadon (krome de la nuna eminenta 25-minuta Esperanto-programo) **plian 25-minutan ekumenan kaj interreligian programon en esperanto.**

Ĝi povus esti titolita, laŭ viaj germanlingvaj programoj, "Religio aktuala" aŭ "Mondo de religioj"; aŭ eventuale: "Interreligio" aŭ "Universala Ekumeno".

Por teknike ebligi la realigadon:

- la direkcio de ORF disponigu ĉiusemajne 25-minutan elsendotempon;
- la religia redakcio de ORF elektu, el sia ĉiusemajna programo, la internacie plej gravajn erojn por la 25-minuta elsendaĵo;
- la esperanto-redakcio de ORF traduku ĝin kaj venontsemajne disaŭdigu. (Se necese ĝi povus trovi pliajn kunlaborantojn inter la vienaj esperantistoj).

Tiu ĉi via esperanto-disaŭdigado povus helpi al venkado de baroj inter ĉiuj religioj (...) La ĉeestintaj rifuĝintoj el Jugoslavio kaj Rumanio, plore rakontinte pri tragikaj travivaĵoj en siaj patrujoj, esprimis la konvinkon ke internacia edukado de ĉiuj homoj ekzemple laŭ la ideo de la japana religia societo Oomoto "*Unu Dio, unu mondo, unu interlingvo*", kapablas estonte preventi analogajn tragediojn. (...)

Kara Christian, (...) Dumkongrese mi traktis kun le esperanto-redaktoro de ORF, S-ano Emil Vokal (...) pri eblo de interreligia kaj ekumena disaŭdigado esperantlingva en ORF. Li rekomendis al mi skribi tiacele rekte al la direkcio de ORF.

(...) En la dimanĉa esperanto-programo de radio-Vieno, la 13-an de septembro, estis konfirmita ricevo de mia letero kaj menciita ties resume

(...) Se vi konsentas kun la propono vi povas (...) **instigi la legantojn subteni ĝin per multnombra skribado** al: Radio Aŭstria internacia, Esperanto-redakcio, A-1136 Wien.

**Radio-Vieno disaŭdigas ĉiudimanĉe de 5h05 ĝis 5h30 kaj de 14h05 ĝis 14h30, laŭ normala (vintra) mezeŭropa tempo, sur ondoj 6155 kHz (49 m) kaj 13730 kHz (22 m).**

Jaroslav Karhan

**Ĉu certe okazos la uk 1994 en seulo ?  
Probable, post kelkaj pliaj finoj de l' mondo...**

La ĉefo de la sudkorea Eklezio de la Misio Davera estis anoncinta ke la fino de l'mondo okazos la 10-an de oktobro. Ĉirkaŭ 500 fideluloj kuniĝintaj en Seulo fervore preĝadis, iuj kriante aŭ plorante. Sed post noktomezo kaj ĉar nenio okazis, ili rehejmeniris.

La sekto aperigis anonceton en gazeto, prezentante siajn bedaŭrojn "**nun kiam Jesuo ne revenis en la anoncita limtempo. Ni humile petas senkulpigon de la socio kaj de la koreaj religiaj medioj pri la fakto ke ni kaŭzis maltrankviligan debaton**".

Davera estas nur unu el la 250 sudkoreaj sektoj kiuj anoncis ke la alveno de la Kristo devos okazi en oktobro, kaj la fino de la mondo dum la sep venontaj jaroj. La antaŭdiroj malsamas laŭ la sektoj.

La plej multnombra, la Misio de la Venontaj Tagoj, atendis la apokaplipson la 28-an de oktobro. Certaj fideluloj ekŝiĝis de sia laboro kaj ne plu lasis siajn infanojn iri al la lernejo. Aliaj forlasis sian familion kiu rifuzis sekvi ilin. Laŭ la polico 20.000 homoj tiel atendadas la finon de l'mondo.

Do ĉu aliĝi al la Universala Kongreso en Seulo? Nu, tamen eble jes! Kaj atendante ĝin aŭ la finon de l'mondo, oni almenaŭ povas aliĝi al la UK en Valencio kie estas planitaj la tradicia Inter-Religia Kunveno Esperantista (IRKE), la ĝenerala jarkunveno de ASISTI, kaj duonhora kunveno de komuna silentado laŭ propono de la lasta IRKE.

( Informoj ĉerpitaj el "Le Monde", 15-10-92, p.32 )

# Meditado

Je tago kiam parolis doktoro Deepak Chopra en Londono

## Ĉio ŝanĝiĝas, sed nia interna spirito ĉiam vivas

*Ĉi tie mi sidas  
kaj meditas.*

Ekster trajno  
arboj kaj kampoj,  
domoj kaj urboj  
rapide pasas.  
Ponto venas  
supreniras  
malaperas.

*Ĉi tie mi sidas  
kaj meditas.*

Ĉirkaŭ mi  
ĉiuj rapidas  
al laboro  
aŭ plezuro ;  
tra sanec' aŭ  
malsaneco ;  
riĉ' aŭ malriĉ' ;  
tra edziĝ' aŭ  
maledziĝo ;  
mortiĝant' aŭ  
naskiĝanta ;  
ĉiuj ŝanĝiĝas.

*Ĉi tie mi sidas  
kaj meditas.*

Mi naskiĝas,  
rapide kreskas,  
studas kaj lernas  
dungi monon ;  
amas kaj naskas  
kiel la Tero ;  
zorgas infanojn,  
tiam lasas  
ilin iri ;  
tiam maljuniĝas -  
ĉu vi pensas  
ke finas tiel ?  
Sed neniel !  
Interna spirito  
kiu gvidas  
nian vivon  
ĉiam kreas  
reinkarniĝas -

*Ĉi tie mi sidas  
kaj meditas.*

Ĉi tie mi sidas  
dum la tero  
cirkumnaĝas  
ĉirkaŭ suno ;  
vintro frostas,  
tiam printempo  
reverdigas,  
somero floras,  
folioj falas.  
Tra jarcentoj  
tero iras  
per evoluo  
al re-aĉeto ;  
reirante  
al Edeno  
tra Doloro  
kaj konflikto ;  
lerniganta  
inteligentecon  
kaj konscion  
en ĉiu parto  
de ĉiu objekto.

*Ĉi tie mi sidas  
kaj meditas.*

Sur platformo  
instruisto  
priklarigas  
antikvan saĝon,  
novajn vojojn  
de pensado,  
de rilato,  
resaniĝo.  
Ĉirkaŭ, centoj da  
viglaj vizaĝoj.  
Milajn benojn  
al ĉiu persono  
kiu komprenas  
kaj tuj faras  
kion diras  
instruisto.

*Ĉi tie mi sidas  
kaj meditas.*

Uzi frazon  
de aliaj tagoj  
"Laŭdu Sinjoron".

*Ĉar tie mi sidas.*

Frances Howard